

EL POPOLA ĈINIO

6
1977

中國報週





紅心永向毛主席
年國輝主席于九月二十五日視察煉鋼

華飛 畫於中



Prezidanto Hua
inter tibetaj popo-
lanoj (Olea pen-
traĵo)



(Maldekstre) Pre-
zidanto Hua an-
taŭ afinacia forno
(Ĉinstila pentraĵo)

Prezidanto Hua
prizorgas la vi-
von de soldatoj.
(Olea pentraĵo)



Prezidanto Hua laŭdas nin. (Ĉinstila pentraĵo)



Kamarado Hua Guofeng laboras en trajno.



Tibetana komunumanino en ĉirkaŭurbo de Lasao prezentas hordean brandon al Kamarado Hua Guofeng

Kamarado Hua Guofeng inter laboristoj de iu elektrejo en Tiangin





Kamarado Hua Guofeng transplanta rizplantidojn kune kun komunumanoj en antaŭurbo de Ĉangŝa, Hŭnan-provinco.



Kamarado Hua Guofeng inspektas la akvokonservan konstruadon de Hijang-gubernio.



Kamarado Hua Guofeng enketas pri la sperto de alta produkto de milio en Ligiaguang-komunumo de Hijang-gubernio.

Kamarado Hua Guofeng interkonsiliĝas kun gvidaj laborantoj de forstokulturo kaj akvoutiligo pri ĝeneraligo de Daĝaj-tipaj gubernioj.



Kamarado Hua Guofeng konsolas laboristojn de la Fera-Ŝtala Fabriko de Tangŝan post tertremo.



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Enhavo

KOVRILO:

Tamburindanco de infanoj

DORSKOVRILO:

Paŝtado



Prezidanto Hua en militaj jaroj	2
Kamarado Hua Guofeng en Hunan	6
Vizito al Kamarado Hua Guofeng	10
Amika vizito	13
Pri la frakaso de la kontraŭpartia "kvarpersona bando" en Ĉinio	16
Batalo de Daĝaj-anoj kontraŭ Giang King	21
Vizito al petrol-havenoj (daŭrigo)	25
Ĝaŭ Lanjing — modelo de bredado de silkraŭpoj	30
Laŭplana naskolimigo en Ĉinio	32
Serva grupo de ruĝgardianetoj	34
Printempa tajdo (poemo)	36
TEATRAĴOJ KAJ FILMOJ: Naskiĝo de piana konĉerto	40
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La Opia Milito	43
ĈINAJ NACIECOJ: La tu-oj	46
KURANTAJ AFEROJ	48

Prezidanto Hua

EN aŭtuno de 1937, la japana imperiismo komencis plenumpleksan agresan militon kontraŭ nia lando.

En vintro de tiu jaro, la japanaj agresantoj entruĝis en Giaŭĉeng-gubernion de Ŝanhi-provinco kaj freneze ruinigis la lokon per hommortigo, dombruligo, perfortigo kaj forrabado.

En la malfacilegaj tagoj vualitaj de la milito, respondante la grandan alvokon de la Komunista Partio de Ĉinio pri rezistado kontraŭ la japana agreso por savi la patrolandon, la 17-jara Kamarado Hua Guofeng aliĝis al la revolucia vicaro. En ĝi, li diligente studis teorion pri la revolucio, pene praktikis instruojn de Prezidanto Maŭ kaj gvidis la amasojn al brava batalo.

I

En la komenco de la jaro 1940, Kamarado Hua Guofeng laboris kiel estro de la kontraŭjapana nacisava ligo de laboristoj, kamparanoj, junuloj, virinoj kaj armitaj fortoj de Giaŭĉeng-gubernio. Por mobilizi la vastajn amasojn al disvolvo de la popola milito kontraŭ Japanio, spite de sia vivdanĝero li tage kaj nokte aktivadis inter la amasoj por propagandi al ili la kontraŭjapanan nacisavan politikon de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ekspliki la aserton de Prezidanto Maŭ pri la nepra venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Li entuziasme instigis la amasojn: “Leviĝu al batalo kontraŭ la japanaj agresantoj kaj neniam submetiĝu al la malamikoj!” En trejna kurso de partianoj kaj kadroj de la bazaj unuoj, li diris: “Sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, la revolucio certe venkos.” Dank’ al propagando kaj organizado de Kamarado Hua Guofeng, en Giaŭĉeng-gubernio stariĝis la Kontraŭjapana Gerila Taĉmento

kaj la kontraŭjapanaj organizoj de junuloj, virinoj kaj infanoj. Sonis tra Giaŭĉeng-regiono la kontraŭjapana kantado “la laboristoj, kamparanoj, soldatoj, lernantoj kaj komercistoj kune batalu por savi la nacion el pereco”.

II

La amasoj estis organizitaj. Tamen, al ili tre mankis armiloj. Kiel ili povis, kun malplenaj manoj, kontraŭbatali la ferocajn malamikojn armitajn per aeroplanoj, kanonoj kaj maŝinpafiloj? De kie oni povis havigi al si pafilojn kaj municion en la malfacilegaj jaroj?

En iu kunveno de la Partia Komitato de Giaŭĉeng-gubernio, Hua Guofeng proponis: “Mobilizu la amasojn por fari armilojn per propraj fortoj!” La komitato aprobis lian opinion kaj asignis al li la laboron.

Iun profundan nokton, Hua Guofeng kunvenigis kadrojn de pli ol 10 distriktoj kaj vilaĝoj por diskuti la aferon pri memfabrikado de armiloj. Li diris al la kunvenantoj: “Por fari pulvon ni povas mem prepari salpetron el la tero sur nia monto; por fari armilojn ni utiligos la ferajn idolojn en la templo sur la monto kaj la senutilajn ferajojn memvole donitajn de la amasoj. Mankas al ni sulfuro, ni povas havigi ĝin al ni en la lokoj okupataj de malamikoj!”

Lia analizo larĝigis la pensvojon al la kadroj. Ili kun plena fido konkure sin anoncis por plenumi taskojn havigi sulfuron, fari salpetron. . .

Post nelonge, la krudmaterialoj estis transportitaj en iun vilaĝon profunde en montaro. Hua Guofeng alvenigis du teknikistojn de la gubernia departemento de armitaj fortoj, kaj li martelis kaj hejtis kune kun la aliaj. Tiamaniere ili sta-

en Militaj Jaroj

rigis la unuan kontraŭjapanan “munician kooperativon” de Giaŭĉeng. Post kiam la unua nombro da minoj kaj grenadoj estis elfaritaj, Hua Guofeng organizis la ĉefan parton de milicianoj kaj trejnadis ilin por manipuli la armilojn. Samtempe li elmetis sloganon “Ĉiu familio scipovu enterigi minon kaj ĉiu homo scipovu ĝin eksplodigi.”

La tekniko de farado kaj enterigado de minoj estis rapide disvastigita; kaj la “municiaj kooperativoj” multiĝis de unu ĝis du, tri, ... kaj en malpli ol kvar monatoj multaj vilaĝoj de Giaŭĉeng jam estis armitaj per minoj. Kun progreso de la tagoj oni jam povis fari ferminojn, ŝtonminojn, lignominojn, ĉenigitajn minojn, ŝnurtirajn minojn, ktp. La japanaj agresantoj entrudiĝintaj en la montregionon por “balaado” ofte mortis aŭ vundiĝis de la minaj eksplodoj. La mina milito en Giaŭĉeng sub la organizo kaj komando de Hua Guofeng famiĝis tra Ŝanhi-Sujjuan-limregiono.

III

En oktobro de 1942, Prezidanto Maŭ instrukiis, ke Ŝanhi-Sujjuan-limregiono forpeli la malamikojn. Hua Guofeng rezolute plenumis la instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj la loka partia komitato kaj mobilizis la amasojn al forpelado de malamikoj.

La fuorto de la japanaj agresantoj en la vilaĝo Ĝilan estis situanta najbare al la kontraŭjapana bazloko kaj grave minacis la bazlokon. La partia komitato de Giaŭĉeng-gubernio decidis rapide forigi la fuorton. Laŭ la decido de la partia komitato de la gubernio, Kamarado Hua Guofeng venis al la partia komitato de la tria distrikto, al kiu la vilaĝo Ĝilan apartenis, kaj kunvenigis la kadrojn, por esplori kaj fari konkretan aranĝon. Ili organizis kaj gvidis la vastajn amasojn por dis-

volvi la aktivadon de forpelado de la malamikoj. Sub protektado de la armita labortaĉmento, la amasoj translokis la grenon de la ĉirkaŭaj vilaĝoj de la malamika fuorto, kaj jetis mortajn hundojn kaj fekaĵon en la putojn uzatajn de la malamikoj por blokado de greno kaj akvo al la lastaj. La japanaj agresantoj sin trovis en la senelireja situacio pro manko de greno kaj akvo, kiel formikoj en varmega kaldrono. Kaptinte la ŝancon, Hua Guofeng kune kun la milicianoj enterigis minojn, detruis ŝoseon, fortondis elektrodronon, baris atakon de la malamikoj kaj faris politikan propagandon al ili. Sub tiaj pezaj batoj la malamikoj fine forkuris devigite. La fuortoj de la malamikoj estis forigitaj unu post alia, dum nia bazloko estis senĉese plivastigata. Ŝanhi-Sujjuan-limregiono tiutempe sendis raporton al Prezidanto Maŭ kaj CK de KPĈ, en kiu estis aparte menciita la forigo de la malamika fuorto en Ĝilan-vilaĝo.

Sub gvido de Hua Guofeng, la gerila taĉmento kaj milicianoj de Giaŭĉeng kuraĝe kaj lerte batalis kontraŭ la malamikoj kaj gajnis venkojn unu post alia. La fame konata sep-diurna batalo en la loko kontraŭ la japanaj agresantoj estis viva batalekzemplo, kiun li direktis aplikante la militan principon de Prezidanto Maŭ **“La malamiko almarŝas, ni retiriĝas; la malamiko kampadas, ni ĝenas; la malamiko laciĝas, ni atakas; la malamiko retiriĝas, ni persekutas”**.

En aŭtuno de 1941, la japana agresa armeo koncentris la trupojn de la gubernioj Giaŭĉeng, Venŝuj kaj Fenjang, kaj faris en du kolonoj “balaan” batalon kontraŭ la kontraŭjapana bazloko. Hua Guofeng persone gvidis la gerilanojn kaj milicianojn al batalo kontraŭ la malamikoj. Tiam, la nombro de la malamikoj estis pli multa ol la nia. Kiel batali? Post kiam Hua Guofeng kune kun aliaj kamaradoj analizis la intencon



de la malamikoj, li decidis: “Se la kondiĉo estos favora al ni, ni do batalu; se ne, ni retiriĝu.” Li embuskigis niajn batalantojn sur la altaj montoj ambaŭflanke de valvojo. Kun multaj militistoj kaj bonaj armiloj, la japana agresa armeo marŝis parade. Apenaŭ ili eniris la valon, la milicianoj eksplodigis minojn kaj tiel ekstermis pli ol 40 malamikojn. La ĵus batitaj malamikoj kun furiozaj krioj sin ĵetis al la milicianoj, sed

jam malaperis la milicianoj sub gvido de Hua Guofeng. Ne trovinte nian trupon, la malamikoj daŭre antaŭenmarŝis, dum la milicianoj jam translokiĝis kaj elektis novan batalejon en la pliantaŭa montvalo malfavoran al la malamikoj. Kiam la malamikoj plue iris en la krutan valon, jam noktiĝis. Ĝuste en tiu tempo, laŭ ordono de Hua Guofeng denove komenciĝis batalo. Ferminoj kaj ŝtonminoj eksplo-

diĝis, kugloj kaj grenadoj pluve falis inter la malamikojn, tiel ke la japanaj agresantoj suferis gravan perdon. La kolerigitaj malamikoj tuj venigis sian alian kolonon kaj intencis ambaŭ-flanke ataki la milicianojn. Sed la trupo komandata de Hua Guofeng rapide retiriĝis de la batalo kaj iris sur la monton por ripozo. Nokte, kiam la lacigitaj japanaj agresantoj ĵus enlitiĝis, subite sonis pafoj ĉirkaŭ la vilaĝo, kio ĵetis la malamikojn en grandan ĥaoson. Kiam ili kuris ekster la vilaĝon, ili nenium vidis. Post kiam ili ĵus revenis, la pafoj sonis refoje. En sinsekvaj sep diurnoj, Hua Guofeng kaj la de li gvidata milicia trupo sagace batalis kontraŭ la entrudiĝintoj. La lacigitaj malamikoj postlasis pli ol 200 kadavrojn, deprimite finis la “balaadon” kaj retiriĝis en la fuorton.

IV

Prezidanto Maŭ montris, ke la kompartianoj devas esti modeloj de kuraĝa batalo. Hua Guofeng ĝuste estas tia kompartiano.

En somero de 1946, Ĉiang Kajŝek komencis la plenumpleksan enlandan militon. Tiam la trupo de ĈPLA garnizonanta en Giaŭĉeng estis provizore formovita. La trupoj de Ĉiang Kajŝek kaj Ŝanhi-a militaristo Jan Hiŝan kiel malsataj lupoj ĵetiĝis al la liberigita regiono. Tiam Hua Guofeng, kiel sekretario de la gubernia partia komitato kaj politika komisaro de la gubernia milita departemento, gvidis la lokajn trupojn en Dongcun-vilaĝo por kontraŭbatali la malamikojn.

En iu frumateno, pli ol 200 malamikoj en norda kaj suda direkto senbrue sieĝis la milicianojn de Huangni-vilaĝo. La nordaj malamikoj apenaŭ proksimiĝis al la vilaĝo, ili tuj trafis fortan baton de la milicianoj. Antaŭ ekiro de la malamikoj, Hua Guofeng jam informiĝis pri ilia intenco. Li tuj manovris batalajn fortojn kaj preparis la kaptilon. Vidinte ke la nordaj malamikoj estis baritaj, sudaj malamikoj rapide alvenis kaj intencis sieĝi la milicianojn. Sed Hua Guofeng gvidis sian trupon jam transiri kaj atendi ilin sur la vojo. Kiam la malamikoj alvenis, nia trupo faris subitan atakon kontraŭ ili. La malamikoj tiam jam sciis ke ili falis en

la kaptilon kaj devis haste batali kontraŭ ni. Ankaŭ la milicianoj de Huangni-vilaĝo ilin ĉirkaŭis de la posta flanko. La sudaj malamikoj konfuzite kuris por eskapi el la sieĝa cirklo. Tamen, la tempo ne permesis al ili tion fari. Fine, ili estis tute ekstermitaj. Ankaŭ la nordaj malamikoj estis solide batitaj kaj panike forkuris.

V

En Vugiaĝuang-vilaĝo de Giaŭĉeng, hodiaŭ ankoraŭ cirkulas la rakonto pri Hua Guofeng, kiu repuŝis atakon de la malamikoj per lerta aranĝo.

En iu tago de vintro de 1946, kiam Hua Guofeng komandis la milicianojn transloki la armeon grenon, li subite ricevis informon, ke du kompanioj da banditaj armeanoj de Ĉiang Kajŝek kaj Jan Hiŝan estis senditaj al Vugiaĝuang-vilaĝo por forrabi grenon. Tiam, restis nur pli ol 20 batalkapablaj milicianoj en la vilaĝo, sed granda kvanto da greno ankoraŭ ne estis translokita. Kiel fari?

Ĉiuj direktis sian rigardon al Komisararo Hua. Post profunda cerbumado Hua Guofeng aranĝis batalan dispozicion. Unue, li movis la amasojn al la monto post la vilaĝo, kaj komandis la milicianojn enterigi minojn sur la ĉefa vojo ĉirkaŭ la vilaĝo. Poste, li mansvinge diris: “Venu kun mi!” En la longtempa batalado, la soldatoj tre konfidis al Komisararo Hua. En malfacila aŭ danĝera tempo, se nur Komisararo Hua venis, bona ideo aperis. En tiu momento la soldatoj rigardis aplomban sintenon de Komisararo Hua kaj estis plenaj de fido je la venko. Post nelonge, la malamikoj entrudiĝis arogante. Kiam ili proksimiĝis al la vilaĝo, ili trovis ke sur la monto ĉe la vilaĝo instaligis multaj telefonaj fadenoj kaj gardostaris bone armitaj batalantoj de ĈPLA. La malamikoj misopiniis, ke ili renkontis ĉefan forton de ĈPLA, kaj konsterniĝis pro tio. Timante falon en nian “sakon”, ili tuj volis retiriĝi, sed jam malfruiĝis. Tiam, sur la monto ĉie aŭdiĝis pafoj kaj laŭtkrioj. La malamikoj misopiniis, ke ili trafis embuskon, kaj tutforte kuris returne, forlasinte siajn pafilojn kaj municion.

Kiam multaj veteranaj batalantoj, kiuj iam sekvis Hua Guofeng en multaj intensaj bataloj, parolis pri kunvivado kun Hua Guofeng en la militaj jaroj, ili kun estimo kaj amo diris, ke Komisararo Hua estis karulo de soldatoj.

La batalantoj rememoris, ke en kriza momento Komisararo Hua zorgis nur aliajn kaj sekurecon de la kolektivo. Iufoje, kiam li gvidis pli ol 40 milicianojn por plenumi taskon, ili subite renkontis pli ol 100 malamikojn. Tiam, longa batalo estis maltaŭga. Hua Guofeng unuflanke pafis kaj samtempe ordonis la milicianojn retiriĝi. Li restigis nur unu milicianon por kune kun li ŝirmi la retiriĝon. Vidinte, ke nur estis du homoj sur nia pozicio, la malamikoj kriaĉis "kaptu vivantajn!" kaj svarme alpuŝiĝis. Hua Guofeng aplombe pafis la lastajn kuglojn al la malamikoj kaj poste diris al la batalanto: "Restigu unu grenadon por mi, vi rapide retiriĝu!" La batalanto ne volis forlasi Hua Guofeng. Li demetis de si la lastajn du grenadojn, donis unu al Hua Guofeng kaj forte ĵetis la alian al la malamikoj. Kiam la malamikoj estis konsternitaj, la grenado de Hua Guofeng eksplodis ankaŭ sur iliaj kapoj. Utiligante tiun ŝancon kaj la bone konatajn vojojn, ili ambaŭ sekure retiriĝis el la batalo.

En iu tago de majo de 1942, Hua Guofeng kaj iu kuriero alivestiĝis por plenumi taskon. Kiam ili venis en iun vilaĝon okupitan de malamikoj, ili aŭdis ke la pupa vilaĝestro diris al la vilaĝpolicano: "Sendu al la japana armeo la du kaptitajn soldatojn de la Okavoja Armeo." Returninte sian kapon Hua Guofeng vidis ke alvenis la du streĉite ligitaj soldatoj eskortitaj de la vilaĝpolicano. Li decidis mortigi la malamikojn por savi la kunbatalantojn. Li gestis al la kuriero per okuloj kaj faris kelkajn paŝojn antaŭen enmetinte sian dekstran manon en sian talion. Kiam la vilaĝpolicano ekvolis insulti, Hua Guofeng sin turnis kaj jam direktis la pistolon al li. Aŭdiĝis "peng", la aĉulo jam falis surteren. La vilaĝestro timigite forkuris. Tiel estis savitaj la du kaptitaj batalantoj de la Okavoja Armeo...

La batalaj aktivadoj de Prezidanto Hua Guofeng en la junaj jaroj ankoraŭ estas profunde tenataj en la memoro de la popolo de Ljuliangmontregiono.

GONG HUA:

Kamarado

HUNAN estas la hejmloko de Prezidanto Maŭ Zedong kaj ankaŭ la loko, kie Kamarado Hua Guofeng longe laboris.

Kamarado Hua Guofeng laboris tie kiel sekretario de la partiaj komitatoj de la gubernioj Ĥiangjin, Ĥiangtan, Ĥiangtan-subprovinco kaj Hunan-provinco. Li faris kontribuon en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj faris profundan impreson sur tieaj popoloj.

I

En aŭgusto de 1949 liberiĝis Ĥiangjin-gubernio en la norda parto de Hunan. Grupo da partiaj kaj registaraj laborantoj venis en la gubernian urbon en ĝoja celebrado de la venko per tamtamado kaj tamburado. Ĉe la kapo de la kolono iris junulo altstatura. Li estis Kamarado Hua Guofeng, la unua sekretario de la partia komitato de Ĥiangjin-gubernio post la Liberiĝo.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, ne nur superakvego kaj skistosomo, sed ankaŭ la postrestaj banditoj de Kuomintango furiozis ĉie en Ĥiangjin. Tio senhejmigis pli ol 100,000 loĝantojn. Kamarado Hua Guofeng, tiam nur 28-jara, rezolute observis la instruojn de Prezidanto Maŭ. La gubernia partia komitato sub lia gvido firme sin apogis sur la malriĉkamparanoj kaj dungitoj, mobilizis la amasojn por likvidi banditojn kaj subpremi lokajn tiranojn kaj kontraŭ-revoluciulojn. En mallonga tempo pliboniĝis la socia ordo kaj stariĝis la loka popola registaro, kiu donis helpojn al la suferantoj de la naturaj katastrofoj kaj gvidis la popolon en restarigo kaj disvolvo de la produktado. Post tio ĝi disvolvis grandskale la movadon de agrara reformo, kiu frakasis la regadon de feŭdaj bienuloj super la kamparanoj longan je miloj da jaroj.

En sia preskaŭ du-jara laborado en Ĥiangjin, Kamarado Hua Guofeng, kun sandaloj sur la

Hua Guofeng en Hunan

piedoj kaj kunportante pluvombreton kaj lanternon, ofte piediris de vilaĝo al vilaĝo por propagandi al la amasoj politikojn de la Partio. Sub lia gvido Hiangjin akiris gravan sperton en la agrara reformo kaj subpremado al la kontraŭrevoluciuloj kaj estis plurfoje laŭdata de la supera partia komitato.

Post nelonge, Kamarado Hua Guofeng estis promociita al la posteno de sekretario de la partia komitato de Hiangtan-subprovinco. Tiutempe, la movado de agrikultura kooperigo estis disvolviĝanta tra la tuta lando. Li profundiĝis en la kamparon por fari enketon kaj esploradon kaj gvidi la movadon. La Interhelpa Grupo de Liu Ĝengĉun, unu el la plej fruaj interhelpaj grupoj en Hunan, kaj la Dongtingvej-a Altgrada Agrikultura Kooperativo, la unua altgrada agrikultura kooperativo de Hunan, estis starigitaj rekte sub lia gvido. La agrikultura kooperiga movado de Hiangtan-subprovinco ĉiam iris en la plej antaŭa viĉo de la provinco. Ĝis marto de 1955, Hunan starigis 12,000 agrikulturajn kooperativojn, kaj 40% de ili sin trovis en Hiangtan-subprovinco.

Poste, kiam Liu Ŝaŭki antaŭenpuŝis reviziisman linion kaj volis nuligi agrikulturajn kooperativojn, Kamarado Hua Guofeng rezolute bojkotis tian eraron. Li kunsidis kun kamparanoj, kuragiĝis ilin venki malfacilojn kaj bone funkciigi agrikulturan kooperativon kaj direktis ilin en solvado de multaj konkretaj problemoj en mastrumado de kooperativoj. En julio de tiu jaro Prezidanto Maŭ faris raporton *Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo*. Observante la instrukciojn de Prezidanto Maŭ en la raporto, li entuziasme gvidis la kamparanojn en la batalo por firmigi kaj disvolvi agrikulturajn kooperativojn.

En 1959, la dekstra oportunisto Peng Dehuaj faris atakon al la Partio, kalumniante la ĝene-

ralan linion de la Partio pri konstruado de socialismo, la grandan impeton de la nacia ekonomio kaj la movadon de popolkomunismo en la kamparo. Tiam, Kamarado Hua Guofeng estis faranta enketadon en kamparo de iu gubernio, kaj verkis enketan raporton, en kiu li varme priantis la grandajn venkojn de la ĝenerala linio de la Partio, la granda impeto kaj popola komunumo per granda kvanto da faktoj. Krome, li publikigis sian artikolon *La Venko Apartenas al Tiuĵ Kiuĵ Alte Tenas la Ruĝan Flagon*, en kiu li refutis kalumnion de dekstraj oportunistoj per faktoj de la gubernio kaj defendis la proletan revolucion linion de Prezidanto Maŭ.

En tiu jaro, okazis sur Luŝan la Oka Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio, kiu repuŝis la atakon de Peng Dehuaj. Post la sesio, Prezidanto Maŭ proponis kaj la Centra Komitato de la Partio sankciis, ke Kamarado Hua Guofeng estu nomumita kiel sekretario de la partia komitato de Hunan-provinco.

De 1959 ĝis 1961, pro la subfosado de la Ĥruŝĉov-a renegata kliko kaj serioza natura plago, nia lando renkontis provizoran ekonomian malfacilon. Utiligante la ŝancon, Liu Ŝaŭki antaŭenpuŝis, en la kamparo, la politikon de plivastigo de parcelo por privata uzo kaj liberaj merkatoj, pliigo de etaj entreprenoj mem respondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj kaj fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado, intencante restaŭri kapitalismon. Travidinte la danĝeron de la reviziisma linio, Kamarado Hua Guofeng gvidis la amasojn al kritiko de reviziismo kaj pesimismo, instigis la amasojn unuigi, rektigi la talion kaj venki la provizoran ekonomian malfacilon. Kun laborgrupo sub sia gvido li iris kvarfoje al Maŭtian-distrikto de Juejang-gubernio. La popolanoj de Maŭtian ne submetiĝis al malfaciloj. Ili reformis montojn kaj akvojn kaj daŭre antaŭenmarŝis sin apogante sur



Kamarado Hua Guofeng inspektis la akvokondukan konstruaĵon de la Ŝaŭŝan-a Irigacia Regiono, en 1965.

la fortoj de la popolaj komunumoj. Kamarado Hua Guofeng ĝustatempe resumis la sperton de Maŭtian kaj alvokis la tutan provincon lerni de Maŭtian kaj persisti en la direkto de socialismo. Dum sia inspektado al la laboroj de Hunan, Prezidanto Maŭ dufoje aŭskultis raporton de Kamarado Hua Guofeng pri Maŭtian kaj alte taksis tieajn laborojn.

En Hiangtan-gubernio sin trovis Kinglian-brigado, kiu antaŭe estis postiĝinta brigado. En 1962, influite de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, ĝia kolektiva ekonomio trafis seriozan perdon. Kamarado Hua Guofeng venis tien kun laborgrupo sub sia gvido. Li faris enketon al la komunumanoj, interparolis kun bazaj kadroj unu post alia kaj ripetade propagandis la veron, ke nur socialismo povas savi Ĉinion. Li persone helpis la brigadon fari produktan planon kaj aĉeti bonspaciajn porkidojn, fiŝidojn, fruktajn arbidojn ktp. Kinglian-brigado rapide bridis la kapita-

lisman tendencon, ĝustigis sian direkton kaj ŝanĝis sian fizionomion.

II

La industria bazo de Hunan estis tre malforta en la pasinteco. Sub la gvido de Kamarado Hua Guofeng, la popolanoj de la provinco pene disvolvis industriajn produktadon sin apogante sur la propraj fortoj kaj akiris grandan sukceson.

Por disvolvi kemisterkan industrion, li persone serĉis fosforan minon kune kun amasoj kaj organizis ekspluatadon. Post tio li mobilizis amasojn por konstrui malgrandajn kemisterkajn fabrikojn. En tri jaroj la provinco konstruis pli ol 80 malgrandajn nitrogensterkajn fabrikojn, kiuj multe akcelis agrikulturan pliprodukton.

Antaŭ la Liberiĝo Hunan ne produktis feron, ŝtalon, salon kaj karbon. Sub prizorgo de la provinca partia komitato gvidata de Kamarado Hua Guofeng, Hiangtan kaj Lianjuan konstruis

ferajn-ŝtalajn fabrikojn kaj disvolvis ankaŭ la industrion de karbo kaj salo.

Prezidanto Maŭ entuziasme laŭdis ke la fabrikoj de komunumoj aŭ brigadoj estas brila espero. Kamarado Hua Guofeng aktive klopodis por disvolvi tiajn fabrikojn. Sub liaj subteno kaj helpo Cajgiangang-komunumo starigis sinsekve kalkopreponejon, riparejon de agrikulturaj maŝinoj, cementan fabrikon kaj insekticido-farejon. Nun, preskaŭ ĉiuj komunumoj kaj brigadoj de la provinco jam havas siajn fabrikojn por servi al la agrikultura produktado.

Sub la gvido de Kamarado Hua Guofeng kaj la provinca partia komitato, rapide disvolviĝis la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo en Hunan-provinco.

Lernante de Daĝaj, Anhiang-gubernio en norda Hunan reformis siajn montojn kaj akvojn kaj atingis stabilan altan produkton de greno. Hintian-gubernio en suda Hunan reformis la grundon kaj formis novajn kampojn, kaj per tio rapide superis la norman produktokvanton de greno difinitan de la ŝtato. Kamarado Hua Guofeng venis al la du avangardaj gubernioj, helpis ilin en resumo de la sperto de lerno de Daĝaj kaj alvokis la tutan provincon lerni de la du gubernioj. Prezidanto Maŭ ĝoje laŭdis ilin, dirante: "Hunan nun havas siajn modelojn, Anhiang en la nordo kaj Hintian en la sudo."

Kamarado Hua Guofeng tre zorgis pri la konstruado de Ŝaŭŝan. La granda akvokonduka konstruaĵo de la fame konata Ŝaŭŝan-a Irigacia Regiono estis konstruita sub lia gvido. La ĉefa kanalo de la nomita konstruaĵo longas je 240 km. Ĝi devis transpasi montojn, ravinojn kaj riverojn, por tio oni devis trabori tunelojn, konstrui akveduktojn kaj fosi multajn branĉajn kanaletojn. La tuta konstruado estis tre malfacila. Kamarado Hua Guofeng estis la ĉefa komandanto de la konstruado. Li mobilizis centmil konstruantojn kaj finis, en malpli ol dek monatoj, la konstruadon, kiu bezonas tri jarojn laŭ la antaŭa takso. En la konstruado li plene mobilizis la amasojn kaj fidis iliajn saĝon kaj forton, ofte partoprenis en fizika laboro kaj interkonsiliĝis kun laboristoj kaj teknikistoj pri la konstrua plano. Foje, en iu tunelo okazis serioza

terfalo. Malgraŭ la danĝero li kune kun laboristoj kaj teknikistoj eniris en la tunelon longan je dekoj da metroj por esplori kaj analizi la terfalon, kaj trovis rimedon por solvi la problemon. Sub la gvido de Kamarado Hua Guofeng, la amasoj plantis arbojn ambaŭflanke de la kanaloj kaj forstumis la proksimajn montojn. Li propramane registris popolan kanton prikantantan la revolucian spiriton de la Ŝaŭŝan-aj popoloj:

*Sur alta monto instaligis akvoflu' kanala,
ĝi kuras trans la montdekliniv' kun ridsonoro
klara:
"Antaŭe iris mi malsupre ĉe l' piedo via,
hodiaŭ mi rapidas sur via kapo jam sen-
bara."*

III

Kamarado Hua Guofeng ĉiam diligente studas Marksismen-Leninismen kaj la verkojn de Prezidanto Maŭ de dekoj da jaroj kaj lertas en kombino de teorio kun praktiko.

Kiam la Ĉina Popola Liberiga Armeo militiris suden, al iuj kamaradoj kreskis inklino al komforto kaj timo al penigo. Tion rimarkinte, li lernis kune kun la kamaradoj la verkon de Prezidanto Maŭ *Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio*, en kiu Prezidanto Maŭ kritikis tian animstaton kaj postulis ke la kamaradoj de la tuta partio daŭre persistu en la laborstilo de penema luktado en malfaciloj kaj faru la revolucion ĝis la fino. Kamarado Hua Guofeng rakontis al ili pri la malfacila vivo de la revolucia batalo en la Gingga-montara bazloko gvidata de Prezidanto Maŭ kaj pri la Longa Marŝo por stimuli ilin daŭrigi revolucion kaj batali por krei novajn liberigajn regionojn.

En 1963 Hunan-provinco akiris riĉegan rikolton, malgraŭ granda natura katastrofo. Li postulis ke la diversnivela gvidantoj gardu sin de fiereco kaj malpacienco kaj organizis gvidantojn de la provincaj, subprovincaj kaj urbaj partiaj komitatoj viziti Guangdong-provincon por lerni de ĝi. Post la vizito li verkis *Raporton pri Pri-rigardo de la Agrikultura Produktado de Guangdong* kaj disvastigis en Hunan bonajn spertojn

de aliaj lokoj laŭ sialokaj konkretaj kondiĉoj. Prezidanto Maŭ aprobis tiun raporton kaj per ĝi kritikis la fieremon, konservativismon kaj metafizikan penson de iuj kamaradoj.

Iun tagon de majo de 1970, Kamarado Hua Guofeng venis al la Tuĝia-nacieca regiono en okcidenta Hunan-provinco, piedirinte kelkdek km. por fari enketon kaj esploradon. Survoje li inspektis konstruadon de akvoutiligaj instalaĵoj kaj intime interparolis kun kadroj kaj komunumanoj. En la loko li, spite de subita pluvo de somerkomenco, piediris de montvilaĝo al montvilaĝo por esplori ties revolucion kaj produktadon, resumi spertojn kaj direkti la lokajn kaj provincajn laborojn.

Kamarado Hua Guofeng zorgas pri la vivo de la amasoj kaj ligiĝas kun ili koro ĉe koro.

Laborante en la kamparo li ofte fiziklaboris, lernis kaj vivis kune kun la komunumanoj. Iu onklino diris: “Foje, Kamarado Hua Guofeng loĝis en mia hejmo, tage li estis tre okupita de laboro, nokte li persiste lernis ĝis malfrua horo. Li kaj ni prenis saman manĝon kaj vivis kiel samfamilianoj.”

Amasoj de la Ŝaŭŝan-a Irigacia Regiono ofte parolis pri la ŝtuparoj konstruigitaj de Kamarado Hua Guofeng ĉe la kanalaj bordoj por ili. Post la komenco de la konstruado de la irigacia sistemo, li venis al vilaĝoj de Hianghiang-gubernio por peti opiniojn de la amasoj. Iu pli-ol-70-jara avino diris al li: “La kanalo ja estas bone konstruita. Se oni konstruos por ni ŝtuparon ĉe la bordo por lavi vestojn kaj preni akvon tie, tio

Vizito al Kamarado Hua Guofeng

de ĈEN JONGHIANG*

ESTIS februaro de 1975. Kun granda ĝojo mi gastis en la hejmo de Kamarado Hua Guofeng. Ĉiufoje, kiam mi rememoras la okazaĵon, mia koro longe ne povas kvietiĝi.

La vizito tiel okazis: La partia filio de nia brigado decidis ĝenerale fari viziton al la familioj de la urbaj intelektaj gejunuloj venintaj al nia brigado, por raporti al iliaj gepatroj pri iliaj lernado, fizika laborado kaj pensoj en kamparo kaj kolekti opiniojn de iliaj gepatroj por bone eduki ilin en kunlaboro. Inter tiuj gejunuloj troviĝis ankaŭ Hiaŭli, la filino de Kamarado Hua Guofeng. Pri vizito al la familio de Kamarado Hua Guofeng, nia partia filio longe diskutis, ĉu decas ke ni ordinaraĵ kamparaj kadroj, vizitu gvidanton de la ŝtato kiel ordinaran familieron. Kamarado Hua Guofeng estas tre okupata en traktado de gravaj aferoj de la ŝtato, ni

ne devas ĝeni lian laboron. Kiam ni estis en embaraso, Hiaŭli divenis nian penson kaj ĝustatempe raportis tion al sia patro. Kamarado Hua Guofeng tuj skribis al Hiaŭli ke ŝi transdiru al la partia filio de la brigado, ke se oni vizitos alies familiojn ili vizitu ankaŭ lian kaj lia familio estas preta bonvenigi la gastojn. Informiĝinte pri tio ni ĉiuj sentis grandan ĝojon.

Ĉirkaŭ la 8-a a.t.m. de la 5-a de februaro, mi, du vicsekretarioj kaj tri urbaj kadroj venintaj al kamparo por fizika laboro venis en la hejmon de Kamarado Hua Guofeng. Hiaŭli kaj ŝia patrino varme invitis nin en la akceptejon. Tuj poste, ankaŭ Kamarado Hua Guofeng alvenis kaj intime manpremis kun ni. Post kiam ni sidiĝis, li disdonis al ni cigaredojn kaj teon. Kun rideto li kuraĝigis nin dirante, ke la eduka laboro de nia brigado estas bone kaj zorge plenumata

multe favoros al ni maljunulinoj.” Li aprobis la opinion kaj instrukciis al la konstruaj fakoj de la irigacia sistemo, ke ili konstruu ŝtuparojn kaj pontetojn ĉe la bordo proksime de loĝpunktoj kaj instalu tubon kaj kranon sub la akveduktoj. Tio donis al la amasoj multan oportunon.

Inter la amasoj de Hiangtan-gubernio cirkulas rakonto pri prizorgo de Kamarado Hua Guofeng al tri orfoj. En julio de 1951, la gubernia partia komitato ricevis tri sengepatrajn knabinojn, el kiuj la plej aĝa estis okjara kaj la plej juna dujara. La tiama sekretario de la gubernia partia komitato kaj la politika komisaro de la departemento de la popolaj armitaj fortoj Hua Guofeng decidis, ke la registaro vartu la infanojn kaj komisiis tiun taskon al la maljuna laboristino de la gubernia gastejo Liu Huijing.

Politika Komisaro Hua (la amasoj tiel intime nomis lin) multe prizorgis la orfojn. En festaj aŭ liberaj tagoj li vizitis ilin. Iatempem li sendis al ili mandarinojn, biskvitojn kaj bombonojn. La infanoj intime nomis lin “Onklo Hua”. Rimarkinte lian alvenon, la infanoj tuj sin jetis en lian sinon kaj kantis kaj saltadis de ĝojo.

Gastoj seninterrompe venintaj al la gastejo tre ŝatis la naivajn infanojn kaj ofte sin amuzis kun ili. Kiam oni demandis al ili pri ilia familia nomo, la infanoj ĝoje respondis: “Onklo Hua portas la familian nomon Hua, do ankaŭ ni portas la familian nomon Hua.” Poste, ili nomis sin respektive Hua Ping, Hua King kaj Hua Hiang.

Nun ili jam plenkreskiĝis kaj havas laborpostenojn kaj feliĉajn familiojn.



kaj estas imitinde fari tian vizitadon malgraŭ la longa distanco. Kamarado Hua Guofeng montriĝis modesta kaj afabla. Li traktis nin kiel longe neviditajn karulojn kaj tuj malaperis nia sinĝeneco.

Poste, Kamarado Hua Guofeng detale demandis nin pri la revolucio kaj produktado de nia brigado kaj la gubernio. Li demandis al ni kiel iras la revolucio, kiom da greno produktas ĉiu hektaro kaj kiom da greno ni liveris al la ŝtato. Post kiam ni respondis tion, li demandis ankaŭ kiel ni reformis la naturon. Ni diris al li, ke la partia filio de la brigado disvolvis kune kun la komunumanoj la movadon de lerno de Daĝaj en agrikulturo, nia brigado reformis kaj ordigis la riverbordojn Nanhejan kaj Hihetan, plantis 140,000 arbojn okcidente de la vilaĝo kaj fondis fruktoĝardenon nordokcidente de ĝi. Li demandis al ni pri la akvoutiliga konstruado de la brigado kaj la gubernio. Ni diris al li, ke en Pinggu-gubernio troviĝas tri malgrandaj akvokonservejoj, nia brigado irigacias kampojn per subtera akvo el 12 maŝinputoj, el kiuj 5 estas brikaj putoj fositaj per homforto. Kamarado Hua Guofeng diris ĝoje, ke estas bone fosi putojn sin apogante sur la propraj fortoj laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ kaj ni ja devas nin apogi sur propraj fortoj kaj pene luktadi en malfaciloj!

Li ankaŭ demandis kiel ni ŝanĝis la fizionomion de la brigado. Ni respondis, ke antaŭ la kultura revolucio, la ĉefaj gvidantoj de la partia filio de la brigado ne persistis en la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj la disvolviĝo de la agrikultura produktado estis malhelpita. Ekde la instaligo de la nova gvidantaro de la partia filio, ĝi forte tenis klasbatalon kaj per tio akcelis produktadon, ŝanĝis naturajn kondiĉojn kaj akiris riĉan rikolton en sinsekvaj jaroj. Kamarado Hua Guofeng aŭskultis atente kaj kore edukis nin, ke ni persistu en iro de la vojo de Daĝaj-brigado kaj ŝanĝu naturajn kondiĉojn nin apogante sur la propraj kolektivaj fortoj kaj pene luktante en malfaciloj.

Tiam nia parolo turniĝis de lerno de Daĝaj al la zorgado pri la intelektaj gejunuloj loĝigintaj en kamparon. Kamarado Hua Guofeng demandis, kiom da intelektaj gejunuloj venis al nia brigado kaj kiel ili kondutas. Ni respondis kun ĝojo, ke sume 8 intelektaj gejunuloj venis al ni kaj bone ili kondutas. Li diris elkore, ke ni estu rigoraj al ili kaj ilin hardadu en la tri revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj sciencia eksperimentado en la kamparo. Profitante la ŝancon ni komencis raporti al li pri Hiaŭli. Ŝi estas senluksa en vivo kaj honesta, modeste



lernas de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj kaj aktive partoprenas en kolektiva produkta laboro. Dum laborado ŝi ĉiam prenas sur sin pezan laboron kaj ricevis laŭdojn de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj... Kamarado Hua Guofeng interrompis nian parolon dirante, ke ni devas prezenti ne nur ŝiajn bonojn sed ankaŭ ŝiajn mankojn kaj ni devas esti rigoraj al ŝi.

Kamarado Hua Guofeng estas rigora al sia filino Hiaŭli. Post sia alveno al nia brigado ŝi ĉiam laboras peneme kune kun komunumanoj. Tre malofte ŝi revenis al la hejmo. Iufoje ŝi revenis hejmen kaj diris al sia patro ke ŝi aliĝis al la Partio kaj estis elektita kiel vicsekretario de la partia filio de la brigado. Kamarado Hua Guofeng diris serioze, ke en la pasinteco ŝi fizike laboris kiel komunumano 300 tagojn en ĉiu jaro, kaj nun funkciante kiel kadro ŝi nepre devas fizike labori pli ol 200 tagojn. Ĉiufoje, kiam ŝi revenis hejmen, ŝia patro demandis ŝin pri ŝia fizika laboro kaj edukis ŝin ne disiĝi de la popolamasoj kaj fizika laboro.

Nin profunde edukis la nobla spirito de Kamarado Hua Guofeng montrita en amo al kaj zorgo pri la popolamasoj. Dum la interparolado, Kamarado Hua Guofeng sciigis nin kun peza koro, ke hieraŭ vespere okazis sismo en la regiono de Jingkoŭ kaj Hajĉeng de Liaŭning-provinco. Li ricevis komision de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kaj decidis forveturi antaŭtagmeze per aviadilo por inspekti tiun regionon kaj konsoli la popolanoj. Pro la malbona vetero la aviadilo ne povis ekflugi en ĝustatempe. Li estis atendanta telefonan sciigon. Nur tiam ni eksciis, ke Kamarado Hua Guofeng akceptis nin utiligante tiun elpremitan horon. Ni tre maltrankviliĝis kaj adiaŭis lin. Fine li diris al ni ke ni nepre agu laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj faru novan kontribuon por la revolucio. Kvankam nia gastado en la hejmo de Kamarado Hua Guofeng estis nelonga, sed li faris sur ni profundan impreson neniam forgesiĝan.

** La aŭtoro estas sekretario de la partia filio de Hjugiavu-brigado de Pinggu-gubernio en ĉirkaŭurbo de Pekino.*

Amika Vizito

EN la unua tagdeko de februaro Deng Jingĉaŭ, vicprezidantino de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, faris amikan viziton al Birmo. La birma popolo donis fratan varman bonvenigon al la amikaj senditoj de la ĉina popolo.


Je la kvara horo posttagmeze de la kvina, Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ per speciala aviadilo atingis la aerodromon de Ranguno kaj ricevis varman bonvenigon de U Ne Ŭin, prezidanto de la Socialisma Respubliko de la Unuiĝo de Birmo kaj prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro.

Post la bonveniga ceremonio okazigita sur la aerodromo, Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ veturis al la urbo en akompano de Prezidanto U Ne Ŭin. Ambaŭflanke de la ŝoseo pli ol 10 mejlojn longa staris popolamasoj en vicoj, svingante la naciajn flagojn de la du landoj. Ĉie kien veturis la gastoj, leviĝis hurado kaj aplaŭ-

dado de bonvenigantoj: “Vivu la amikeco inter Ĉinio kaj Birmo!” “Amikeco! Amikeco!”

Tiu kortuŝa sceno rememorigis nin pri la historio de longa kaj vasta amika rilato inter Ĉinio kaj Birmo. La du landoj same suferis agresadon kaj subpremadon de imperiismo kaj koloniismo. En la bataloj kontraŭ imperiismo kaj koloniismo la du popoloj ĉiam simpatiis kaj subtenis unu la alian. Post la stariĝo de la diplomatia rilato inter la du landoj, ili kune elmetis la famajn Kvin Principojn de Paca Kunekzistado. Ĉinio kaj Birmo ĉiam simpatias kaj subtenas la disvolviĝantajn landojn en ilia defendado de la nacia sendependeco kaj la ŝtata suvereneco, en ilia disvolvo de la nacia ekonomio kaj en ilia defendo de siaj riĉfontoj, kaj oponas kontraŭ la klopodo de iu ajn lando aŭ iu ajn ŝtatbloko por starigi hegemonion kaj influferon en iu ajn regiono de la mondo. De multaj jaroj gvidantoj

Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ ricevas bonvenigon de Prezidanto U Ne Ŭin kaj lia edzino sur la aerodromo Ranguno.



kaj diversrondaj personoj de la du landoj faris amikajn intervizitojn. Prezidanto U Ne Ŭin okfoje vizitis Ĉinion, kaj Ĉefministro Ĝoŭ naŭfoje vizitis Birmon. Ilia reciproka vizito senĉese akcelis la firmigon kaj disvolvon de la amika rilato inter la du landoj. En la lastaj jaroj plifortiĝis tiu najbara rilato.

Dum la vizitado Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ multfoje interparoladis kun Prezidanto U Ne Ŭin. Ili laŭdis la amikecon inter la du landoj, esperante, ke tia amikeco pluapaaŝe fortiĝos kaj disvolviĝos.

Antaŭtagmeze de la sepa, Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ prezentis florkronon al la tombo de la birma nacia heroo Generalo Ang San en la centro de la urbo Ranguno. Tie estis enterigitaj sep martiroj kaj starigitaj sep tombŝtonoj. Sub la plej granda el tiuj tombŝtonoj kuŝas Generalo Ang San. En la jaro 1947 la birma popolo levis altan tajdon de batalo por la nacia sendependeco. En tiu tempo la Provizora Registaro de Birmo estrata de Generalo Ang San decidis eltiriĝi el la Brita Konfederacio kaj postulis kompletan sendependiĝon. En la mitingo okazigita en la 19-a de julio tiuj sep herooj estis murditaj de armitaj banditoj instigitaj de britaj

koloniistoj. Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ esprimis sian respekton kaj estimon al tiuj diversnaciecaj martiroj de Birmo, kiuj oferis sian vivon en sia juneco por la nacia sendependeco.

Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ kaj ŝiaj sekvantoj vizitis la ĉijaran foiron de perloj kaj gemoj de Birmo, la mondfaman Grandan Orpagodon de Ranguno kaj la historian urbon Pagan.

Birno abundas je gemoj kaj jado. Inter ĝiaj famaj produktaĵoj troviĝas smeraldo, rubeno kaj safiro. Jam en Tang-dinastio de Ĉinio, Birmo eksportis jadon al Ĉinio por ricevi interŝanĝe ĉinajn silkaĵojn, kio okupis gravan lokon en la komercado inter Ĉinio kaj Birmo. En la komenca periodo de la 13-a jc., la birma registaro invitis ĉinajn jadministojn por ekspluati jadminon. Ekde la jaro 1964, Birmo ĉiujare okazigas foiron de perloj kaj gemoj kaj invitas al ĝi komercistojn el fremdaj landoj kaj regionoj. Ekde la jaro 1972 ankaŭ Ĉinio komencis sendi personaron por ĝin viziti. Prezidanto U Ne Ŭin kaj lia edzino persone prezentis al Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ perlojn, brilajn gemojn, jadaĵojn, duonprilaboritajn jadaĵojn kaj krudajn jadpecojn montritajn en la foiro. La abunda natura riĉfonto de Birmo profunde impresis la ĉinajn gastojn.



Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ en la urbo Pagan

*Vicprezidantino
Deng Jingĉaŭ ri-
gardas la Gran-
dan Orpagodon.*



La Granda Orpagodo konstruiĝis en la 6-a jc. a. K., tie la ĉinaj gastoj vidis brilajn arkitekturon kaj skulptarton de la birma laboranta popolo en antikveco. La pagodo altas je 326 futoj kaj estas ĉirkaŭata de dekoj da diversformaj malgrandaj pagodoj. Tage, ili ore brilas, kaj nokte ili estas hele iluminataj. Tio formas belan vidindaĵon. Antaŭ antikva sonorilego birma amiko rakontis al Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ legendon: Kiu seninterrompe batas la sonorilon je tri fojoj, tiu povas realigi sian deziron. Poste Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ kaj la akompananta Ĉefministro U Sejn Ŭin ekprenis la specialan bastonon kaj faris tri batojn, dezirante, ke eterne vivu la amikeco inter Ĉinio kaj Birmo.

En la oka, la ĉinaj gastoj veturis per speciala aviadilo al Pagan kaj refoje ricevis grandiozan varman bonvenigon. La tridek mil loĝantoj de la urbo preskaŭ ĉiuj eliris por ilin bonvenigi.

La urbo Pagan, fame konata kiel “urbo kun dekmil pagodoj”, estis konstruita en la mezo de

la naŭa jc. En la antikveco ĝi estis ĉefurbo de la feŭda Pagan-dinastio (de 11-a ĝis 13-a jc. p.K.), kiu la unua unuigis Birmon. En la Pagan-a Muzeo troviĝas memorŝtono kun ĉizitaj handlingvaj vortoj, kiu estas historia atesto de amika interkontakto de la du popoloj en la antikveco. En tiu urbo la ĉinaj gastoj vidis brilan antikvan nacian kulturon de Birmo. En januaro de 1961 Ĉefministro Ĝoŭ vizitis ankaŭ tiun urbon. En kiosko apud iu pagodo estas gravuritaj oraj vortoj por memori pri la vizito de Ĉefministro Ĝoŭ al Pagan. La respondeculo de tiu pagodo donacis al Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ serion da fotoj de Ĉefministro Ĝoŭ kaj Vicĉefministro Ĉen Ji faritaj de birma amiko dum ilia vizito al Pagan. Ĉe tio la birmaj amikoj kaj ĉinaj gastoj dronis en rememoro pri Ĉefministro Ĝoŭ. Antaŭ sia forlaso Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ skribis en la notlibro: “Vivu la amikeco inter Ĉinio kaj Birmo!”

La unusemajna amika vizito de Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ al Birmo finiĝis kun plena sukceso.

Pri la frakaso de la kontraŭpartia “kvarpersona bando” en Ĉinio

de HING HONGMIN

HODIAŬ en Ĉinio ĉie vidiĝas vivecaj scenoj de revolucio kaj produktado, kaj senĉese venas el diversaj lokoj de la tuta lando ĝojindaj informoj pri plenumo kaj superplenumo de produktaj taskoj. Ĉinio fariĝis pli esperplena post la frakaso de la “kvarpersona bando”.

La “kvarpersona bando” estas kontraŭpartia kliko formiĝinta el Vang Hongven, eksvicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, Ĝang Ĉunkiaŭ, eksmembro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPC kaj eksvicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, Giang King kaj Jaŭ Venjuan, eksmembroj de la Politika Buroo de CK de KPC. Per ruzo de duvizaĝuloj, ili distordis la fundamentan linion de la Komunista Partio de Ĉinio, subfosis la socialisman revolucion kaj socialis-

man konstruadon kaj intrigis por uzurpi la plej altan gvidantecon de la Partio kaj ŝtato, renversi la diktaturon de la proletaro kaj restaŭri kapitalismon. Post la forpaso de la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong, ili pli freneze intensigis sian aktivadon pri uzurpo de la gvidanteco. La Centra Komitato de la Partio estrata de Hua Guofeng ĝustatempe frakasis ilian kriman intrigon kaj per tio savis la revolucion kaj la Partion kaj gajnis varman subtenon de la popolo de la tuta lando.

KRITIKO KAJ Batalo de Prezidanto Maŭ kontraŭ la “Kvarpersona bando”

Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan delonge jam kovadis intrigon



Diversnaciecaj popolanoj de la Huĝu-a Tu-nacieca Aŭtonoma Gubernio de Kinghaj prikantas Prezidanton Hua.



Popolanoj de la urbo Hiangtan, Hunan - provinco, akلامas la nomumon de Kamarado Hua Guofeng kiel prezidanto de CK de KPC kaj de la Milita Komisiono de CK de KPC.

pri uzurpo de la gvidanteco de la Partio kaj ŝtato. Nur pro multfoja eduko, kritiko kaj batalo de Prezidanto Maŭ, ili ne kuraĝis ekagi, kaj devis premi sian kontraŭrevolucionan ambicion kaj atendi bonan ŝancon. En la Granda Proleta Kultura Revolucio ili levis, en kunago kun la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ, reakcian pensfluron de “suspekto de ĉiuj gvidantoj kaj faligo de ĉiuj gvidantoj” kaj kreis ĥaoson por kapti la regpotencon. Post kiam la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ ĝustatempe frakasis la intrigan puĉon de Lin Biaŭ, la “kvarpersona bando” ankoraŭ ne volis forlasi sian ambicion kaj daŭre faris intrigan aktivadon. Precipe post la Deko Kongreso de la Partio ili rapidigis siajn kontraŭrevolucionajn paŝojn.

En la komenco de 1974 Prezidanto Maŭ iniciatis kaj gvidis la movadon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. La penso de Lin Biaŭ pri restaŭro kaj regreso devenis de la doktrino de Konfucio, kiu persistis en restaŭro de la sklava socio en Ĉinio antaŭ pli ol du mil jaroj. La movado ja celis elfosi la ideologian radikon de la reviziisma linio de Lin Biaŭ kaj komplete elimini ĝian influon. Tamen profitante la ŝancon, la “kvarpersona bando” dekomence jen

faris raporton, jen sendis materialojn, jen skribis leterojn al iuj unuoj por fari agitadon kaj krei ĥaoson. Ili kriaĉis, ke ili kritikis “modernan Konfucion” kaj eltiros “disciplojn de Konfucio”, per kio ili alude atakis Ĉefministron Ĝou Enlaj kaj aliajn centrajn kaj lokajn revolucionajn gvidantojn.

Prezidanto Maŭ ĝustatempe rimarkis ilian intrigon kaj akre kritikis ilin, ke ĉe ili “furiozis metafiziko kaj unuflankeco”, kaj malpermesis ilin dissendi sonbendojn pri iliaj paroladoj al diversaj lokoj de la tuta lando. Poste, Prezidanto Maŭ persone sankciis dokumenton de CK de KPC, en kiu li montris direkton por la kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, kaj avertis la “kvarpersonan bandon” en la kunveno de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio, dirante: **“Vi devas atenti ke vi ne formu malgrandan sekton de kvar personoj,”** kaj **“ne formu kvarpersonan bandon.”**

En la lasta duonjaro de 1974, kiam la Centra Komitato de la Partio preparis por okazigi la Kvaran Tutlandan Popolan Kongreson kaj konsideris nomumon de gvidantoj de la registaraj institucioj, la “kvarpersona bando” intrige klopodis pri “organizado de kabineto”. Sen sciigo

al la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio, ili sekrete sendis Vang Hongven al Prezidanto Maŭ por akuzi Ĉefministron Ĝou Enlaj kaj aliajn gvidantojn kaj ricevis fortan riproĉon de Prezidanto Maŭ. Poste, Giang King petis aliajn komuniki al Prezidanto Maŭ sian opinion, ke Vang Hongven fariĝu vicprezidanto de la Tutlanda Popola Kongreso. Prezidanto Maŭ tuj malkaŝis ŝin dirante: **“Giang King havas ambicion. Ŝi volas, ke Vang Hongven fariĝu prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj ŝi mem fariĝu prezidanto de la Centra Komitato de la Partio.”**

En la fino de 1974, por batalo kontraŭ kaj prevento de reviziismo Prezidanto Maŭ alvokis la tutan landon lerni teorion pri la diktaturo de la proletaro kaj atentigis la popolon sin gardi de la danĝero, ke la similuloj de Lin Biaŭ uzurpu la ŝtatpotencon. La “kvarpersona bando” senbride distordis kaj ŝanĝis la alvokon de Prezidanto Maŭ. Sub la ŝildo de studo de la teorio pri la diktaturo de la proletaro, malobservante la instruon de Prezidanto Maŭ ke reviziismo nun estas la ĉefa danĝero, ili ĉie distrumpetis, ke “nun empiriismo estas la ĉefa danĝero”. En iu sia raporto Ĝang Ĉungkiaŭ emfazis ke opono kontraŭ empiriismo devas esti prenata kiel “ĉefĉenero”, kaj Giang King kriaĉis, ke empiriismo estas “nia nuna granda malamiko”. Ankaŭ iliaj konfidenculoj diraĉis, ke “la ĉefa danĝero de empiriismo sin trovas en la supera tavolo” direktante la lancpinton al Ĉefministro Ĝou Enlaj kaj aliaj gvidantaj kamaradoj.

Sed ankaŭ tiu intrigo de la “kvarpersona bando” estis travidita de Prezidanto Maŭ. Li kritikis ilin, dirante: **“Laŭ mi, tiu, kiu kritikis empiriismon, mem estas empiriisto.”** Kaj li akre montris: **“En nia partio malmultas la homoj, kiuj vere komprenas Marksismon-Leninismon. Iuj opinias ke ili ĝin komprenas, sed fakte ne. Ili laŭvole insultis aliajn, ja ankaŭ tio estas manifestiĝo de nekompreneo de Marksismo-Leninismo.”** Tio montris ke la “kvarpersona bando” estas politikaj trompisto kiuj ne komprenas Marksismon-Leninismon.

La tri fundamentaj principoj elmetitaj de Prezidanto Maŭ **“Praktiku Marksismon-Leninismon,**

kaj ne reviziismon; unuiĝu, kaj ne splitiĝu; estu malkaŝemaj kaj honestaj, kaj ne faru konspirojn kaj intrigojn” estas kriterio por distingi ĝustan linion de erara. Malobservante la instruojn de Prezidanto Maŭ la “kvarpersona bando” praktikis reviziismon kaj faris splitadon kaj intrigon. En kunvenoj de la Politika Buroo Prezidanto Maŭ plurfoje emfazis la tri fundamentajn principojn de la Partio kaj diris, ke tio estas aprobita de la Naŭa kaj Dekaj Kongresoj de la Partio. Li kritikis ilin, ke ili ne kredas la tri principojn kaj forgesis ilin. Li atentigis ilin dirante: **“Ne formu kvarpersonan bandon, ne plu faru tion. Kial vi ankoraŭ tion faras? Kial vi ne unuiĝas kun la pli ol 200 membroj de la Centra Komitato de la Partio? Estas nebone unuiĝi kun malmultaj, ĉiam nebone.”**

Publike, la “kvarpersona bando” sin ŝajnis akceptantaj la paciencon edukon kaj severan kritikon de Prezidanto Maŭ, tamen post lia dorso ili daŭre firmigis sian sekton. Ili foje-refoje direktis la lancpinton al la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ, provante faligi grandan nombron da partiaj, registaraj kaj armeaj gvidantoj de la centraj institucioj kaj diversaj lokoj kaj anstataŭi ilin. Rimarkinte, ke ili ne korektis siajn erarojn malgraŭ multfoja eduko, Prezidanto Maŭ montris pluapase en 1975: **“Post mia morto eble ŝi (Giang King) kreos malordon.”** Li faris decidon por solvi la problemon de la “kvarpersona bando” kaj montris en la 3-a de majo: **“Se tio estos ne solvita en la unua duono de la kuranta jaro, ĝi estu solvita en la dua duono; se ne ĉijare, do venontjare; se ne venontjare, do en la jaro post ĝi.”**

PEREO DE LA “KVARPERSONA BANDO”

En 1976, profitante malfacilon de la Partio kaj ŝtato la “kvarpersona bando” freneze atakis la Partion, intensigis siajn intrigajn aktivadojn por uzurpi la regpotencon kaj fine trafis hon-tindan pereon.

En la 8-a de januaro nia estimata kaj amata Ĉefministro Ĝou Enlaj forpasis kaj pro tio la tutlanda popolo ekstreme malĝojis. Profitante la okazon, la “kvarpersona bando” kriaĉis ke ili eltiros kaj faligos nombron da “enpartiaj pen-

torifuzantaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon”. Prezidanto Maŭ travidis ilian ambicion kaj persone proponis kaj la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio unuanime aprobis, ke Kamarado Hua Guofeng estu aganta ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro. En la komenco de aprilo Prezidanto Maŭ proponis kaj la Politika Buroo unuanime aprobis, ke Hua Guofeng estu la unua vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro. La “kvarpersona bando” tre malkontentis pro la saĝaj decidoj de Prezidanto Maŭ. Ĝang Ĉunkiaŭ propramane skribis eseon por montri sian malamon al Prezidanto Maŭ kaj insulti Kamaradon Hua Guofeng.

En la 9-a de septembro de 1976 forpasis Prezidanto Maŭ Zedong. La ĉina popolo malĝojegis pro perdo de sia gvidanto. Tamen la “kvarpersona bando” opiniis, ke venis ŝancoj por uzurpi la plej altan gvidantecon de la Partio kaj ŝtato. Kaj ili ekagis. En la sama tago de la forpaso de Prezidanto Maŭ ili jam sciigis en la nomo de la Kancelario de CK de KPC, ke la diversaj lokoj de la lando raportu al kaj petu instrukciojn de ili pri gravaj problemoj, intencante interrompi ligigon de la Centra Komitato de la Partio estrata de Hua Guofeng kun ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj komandi la tutan landon. Ekde la 12-a de septembro Jaŭ Venjuan kaj liaj konfidenculoj en Kinghua-universitato kaj la Pekina Universitato foje-refoje instigis ke oni skribu al Giang King leteron por peti ŝin enoficiĝi kiel prezidanto de CK de KPC kaj prezidanto de la Milita Komisiono de CK de KPC. En la 16-a de septembro la “kvarpersona bando” publikigis per propagandaj instrumentoj regataj de ili la falsan testamenton de Prezidanto Maŭ “agi laŭ la difinitaj principoj”.

Antaŭ sia morto Prezidanto Maŭ absolute ne faris tian testamenton. Falsi tian testamenton estas ilia granda intrigo por fabriki mensogojn kaj spliti la Centran Komitaton de la Partio. En la 2-a de oktobro, kiam Kamarado Hua Guofeng malkaŝis ilian falsan dokumenton, Ĝang Ĉunkiaŭ hipokrite diris, ke oni ne diskonigu la instrukcion de Hua Guofeng “por eviti nenecesajn konfliktojn”. Tamen en la 4-a

de oktobro, en la journalo *Guangming Ribao* de Pekino regata de la “kvarpersona bando” publikigis la artikolo *Ĉiam Agu laŭ la Difinitaj Principoj de Prezidanto Maŭ*. La artikolo diras: “Ŝanĝo de la difinitaj principoj de Prezidanto Maŭ ja estas perfido al Marksismo, perfido al socialismo kaj perfido al la granda doktrino pri daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro.” Ĝi diras ankaŭ: “Ĉiu ajn reviziisma ĉefo, kiu aŭdacos ŝanĝi la difinitajn principojn de Prezidanto Maŭ, havos senescepte malbonan finon.” La “kvarpersona bando” provis kulpigi Kamaradon Hua Guofeng kaj la de li estratan Centran Komitaton de la Partio per “ŝanĝo de la difinitaj principoj de Prezidanto Maŭ” kaj “praktiko de reviziismo” kaj faligi ilin.

Laboristoj de la Ŝanhaja Haveno okazigas kunvenon por kritiki la “kvarpersonan bandon”.



Guste en la kriza momento, kiam la “kvarpersona bando” ekagis por kapti la regpotencon, la Centra Komitato de la Partio estrata de Hua Guofeng frakasis, laŭ la decido kaj aranĝo de Prezidanto Maŭ antaŭ sia morto, ilian kriman intrigon per unu bato, per kio ĝi forigis perfidulojn por la Partio kaj malutilojn por la ŝtato kaj mildigis indignon de la popolo.

Reprezentante la interesojn de la bienuloj, kulakoj, reakciuloj, malbonuloj kaj novaj kaj malnovaj burĝoj, la “kvarpersona bando” longtempe antaŭenpuŝis ekstreme dekstran linion fatalan al la ŝtato kaj popolo, kiu kaŭzis al la Partio kaj ŝtato grandan perdon. Ili estas enpartiaj pentorifuzantaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. La batalo kontraŭ la “kvarpersona bando” estas daŭra batalo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la de ĝi gvidata ĉina popolo kontraŭ la kuomintanga reakciularo kaj estas morta batalo inter la proletaro kaj la burĝaro, kaj inter Marksismo-Leninismo kaj reviziismo. Ĝi ankoraŭfoje pruvis la ĝustecon de la saĝa tezo de Prezidanto Maŭ pri la longeco, akreco kaj komplikeco de la klasbatalo en la socialisma socio. La kompleta frakaso de la “kvarpersona bando” plene montris, ke la antaŭenmarŝado de la ĉina popolo estas nebarebla de ĉiu ajn reakcia forto. La granda

venko super ĝi havas grandan realan kaj profundan historian signifon.

ĈINIO FARIĜIS PLI ESPERPLENA POST LA FRAKASO DE LA “KVARPERSONA BANDO”

Post la frakaso de la “kvarpersona bando” la popolo pleniĝas de ĝojo, kaj la tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando varme subtenas la Centran Komitaton de la Partio estrata de Kamarado Hua Guofeng. Laŭ la aranĝo de Prezidanto Maŭ antaŭ sia morto kaj volo de la popolo, la Politika Buroo de CK de KPĈ unuanime aprobis, ke Kamarado Hua Guofeng estu prezidanto de CK de KPĈ kaj prezidanto de la Milita Komisiono de CK de KPĈ. Apenaŭ disvastiĝis la ĝojinda informo, la tuta lando tuj ekbolis de ĝojo. Oni tamtamis kaj tamburis kaj okazigis mitingojn kaj manifestaciojn por varme celebri la grandan venkon.

Daŭrigante la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ, la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua decidis konduki la proletan revolucionan aferon de Ĉinio ĝis la fino. La Centra Komitato de la Partio rapide faris du saĝajn decidojn pri konstruo de memorhalo de la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Ze-



Komunumanoj de Jangmej-brigado de Minhoŭ-gubernio, Fugian-provinco, skribas dazibaŭ-ojn por kritiki krimojn de la “kvarpersona bando”.

dong kaj pri eldono de la kvina volumo de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj preparo por eldono de la *Verkaro de Maŭ Zedong*. Tio plene spegulis la komunan deziron de la centoj da milionoj da ĉinaj popolanoj. Baldaŭ poste, laŭ la propono de Prezidanto Hua kunvokiĝis la Dua Tutlanda Konferenco por Lerni de Daĝaj en Agrikulturo kaj la Kunveno de la Tutlanda Kunveno por Lerni de Dakiang en Industrio.

Prezidanto Hua Guofeng faris gravan paroladon en la Dua Tutlanda Konferenco por Lerni de Daĝaj en Agrikulturo. Li alvokis la tutlandan popolon diligente studi verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkojn de Prezidanto Maŭ, penetrive malkaŝi kaj kritiki la krimojn de la kontraŭpartia "kvarpersona bando",

levi novan tajdon de lerno de Daking en industrio kaj lerno de Daĝaj en agrikulturo, repreni la perditajn kaŭzitan de la "kvarpersona bando" kaj efektiviigi la grandiozan celajn proponitan de Prezidanto Maŭ kaj elmetitan de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj en sia raporto pri la laboro de la registaro al la Kvara Tutlanda Popola Kongreso: efektiviigi plenampleksan modernigon de niaj agrikulturo, industrio, nacidefendo, scienco kaj tekniko en ĉi tiu jarcento.

La vastaj amasoj ĝoje diris, ke Prezidanto Hua diris kaj faris kion ili volis; kaj ili certe unuiĝos kompakte ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio, diligente konstruos plibone la socialisman patrolandon kaj klopodos por fari kompare grandan kontribuon al la homaro.

Batalo de Daĝaj-anoj kontraŭ Giang King

de VEJ DONG

ESTIS septembro de 1975. La kadroj kaj komunumanoj de Daĝaj plenergie klopodis por akiri novajn venkojn en la produktado kaj bonvenigi per ili la okazigon de la Unua Tutlanda Konferenco por Lerni de Daĝaj en Agrikulturo en Hijang-gubernio. Subite ili ricevis sciigon pri baldaŭa alveno de Giang King al Daĝaj. Ili pensis, ke estante membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio, Giang King certe helpos, direktos kaj kuraĝigos ilin en la revoluciado, same kiel Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj partiaj gvidantoj. Ili atendis ŝian alvenon. Kaj ŝi alvenis en la 8-a de septembro. Tamen ŝia granda parado kaj eksterordinara sinteno surprizis la Daĝaj-anojn kaj ili sentis kvazaŭ kruĉo da malvarma akvo verŝiĝus sur ilian kapon. Ili komparis ŝian konduton kun tiu de Ĉefministro Ĝoŭ, dum lia inspektado al Daĝaj.

En Daĝaj, Ĉefministro Ĝoŭ uzis nur unu apartamenton, dum Giang King mem okupis ĉiujn

domojn de la Daĝaj-a filio de la Internacia Turisma Servo, kiuj sufiĉas por akcepti pli ol 100 fremdlandajn gastojn.

Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam atentigis, ke oni ne malŝparu pro li, dum Giang King havis pli ol 100 sekvantojn kaj ŝiaj manĝaĵoj, trinkaĵoj, vestaĵoj kaj aliaj bezonaĵoj sufiĉaj por plenigi plurajn kamionojn estis senescepte alportitaj de Pekino.

Ĉefministro Ĝoŭ ne permesis ĝeni la amasojn, nek malhelpi la produktadon pro lia alveno, dum Giang King deklaris tuj post sia alveno al Daĝaj, ke estas malpermesite eksplodigi montojn por krei kampojn en sfero de 15 kilometroj, estas malpermesite funkciigi radiodisaŭdigon, estas malpermesite veturigi traktorojn, aŭtojn kaj similajn tra la vilaĝo, estas malpermesite uzi elektran aeroblovilon en restoracio dum preparado de manĝaĵoj kaj eĉ estas malpermesite laŭte paroli.

En Daĝaj, Ĉefministro Ĝoŭ demandis kun kora zorgo maljunajn malriĉkamparanojn pri ilia vivo, intime sidis kune kun komunumanoj sur sama terlito por interparoli pri familiaj aferoj, kun bona apetito prenis saman manĝaĵon kun la amasoj, vicleplene ascendis Hutoŭ-monton, kun granda intereso aŭskultis raporton de kadroj kaj komunumanoj pri ŝanĝiĝo de Daĝaj kaj senlace kaptis ĉiun minuton por fari laboron. Sed en Daĝaj Giang King ne proksimiĝis al la amasoj, tenis sin malvarma al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj ne faris enketadon. Kiam oni invitis ŝin rigardi Hutoŭ-monton, ŝi montris malkontenton. Ŝi ne volis, ke la kadroj raportu al ŝi pri sia laboro, sed ĉiutage klopodis por sin montri kaj distrumpeti, aŭ sin fermis en la ĉambro por rigardi flavajn filmojn kaj aŭskulti malnovajn operojn.

Tiam la Daĝaj-anoj ne komprenis ŝian konduton kaj observis ŝin senvorte. Multaj maljunaj malriĉkamparanoj vidis bienulojn kaj ŝtatoficistojn de la malnova socio. Komparante Giang King kun ili, ili opiniis, ke ŝi ne similas al ka-

droj de nia partio, tamen tre similas al la pasintaj bienuloj kaj ŝtatoficistoj.

Pro kio ŝi venis al Daĝaj? La Daĝaj-anoj havis multajn demandojn pri la konduto de Giang King:

Kial ŝi venigis al Daĝaj tiel multe da homoj el la literaturaj, artaj, edukaj kaj ĵurnalistaj rondoj por sekrete kunveni? Kial ŝi diris en sia raportado al la komunumanoj de Daĝaj, ke “nun iuj el la Centra Komitato provas fari Prezidanton Maŭ nominala”, kaj insultis iujn el la respondeculoj de la Centra Komitato de la Partio? Kial ŝi multe parolis en Daĝaj pri matriarka socio, dirante ke “la matriarka socio estis estrata de virinoj, kaj en la komunisma socio estos reĝino” kaj “virinoj tenos regpotencon”. Laŭ la paroloj kaj agoj de Giang King la Daĝaj-anoj iom post iom komprenis, ke ŝi venis al Daĝaj ne por zorgi ĝin, nek por ĉeesti la Tutlandan Konferencon de Lerno de Daĝaj en Agrikulturo, sed por uzi la lokon de Daĝaj por fari intrigon kaj utiligi la renomon de Daĝaj en la tuta lando por starigi sian reputacion.



Daĝaj-anoj malkaŝas kaj kritikis krimojn de la “kvarpersona bando”.


Sed Giang King ne atendis, ke la Daĝaj-anoj nutritaj de Maŭzedongpenso ne estis trompitaĵoj de ŝi, nek submetiĝis al ŝia povo. Male, ili faris sagacan batalon kontraŭ ŝi.

Giang King volis konstruigi vilaon sur Hutoŭ-monto, tamen la Daĝaj-anoj ne faris tion. Giang King fosigis por si “kontraŭaeratakan tranĉeon” sur Hutoŭ-monto, tamen la Daĝaj-anoj opiniis, ke tio estas nenecesa, ĉar en Daĝaj estas multaj tuneloj. Post foriro de Giang King ili ĝin pleniĝis kaj konstruis sur ĝi porkostalon.

Post la fermiĝo de la Unua Tutlanda Konferenco por Lerni de Daĝaj en Agrikulturo Giang King ankoraŭ pli freneze klopodis por forhaki la ruĝan flagon Daĝaj en kunago kun Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ kaj Jaŭ Venjuan. Ili kalumniis, ke la plenenergia disvolvo de produktado en Daĝaj estas praktiko de “teorio de produktaj fortoj”. Ili ordonis ke la de ili regataj propagandaj instrumentoj ne propagandu avangardajn aferojn de Daĝaj kaj eĉ sendis homojn al Hijang-gubernio por fari agitadon, krei haoson kaj tutforte subfosi la movadon de lerno de Daĝaj. Direktate de Prezidanto Maŭ kaj lia revolucia linio la Daĝaj-anoj firme tenis sin kontraŭ la premado de la “kvarpersona bando”. Ili faris amasan kritikon kontraŭ reviziismo kaj kapitalismo kaj faris ankoraŭ pli grandskalan fundamentan konstruadon de kampoj. En la jaro 1976 ili venkis naturajn katastrofojn de sekeco, superakvo, hajlo kaj tro malalta temperaturo kaj akiris riĉan rikolton de agrikulturo kaj brutobredado, ankaŭ la forstumo kaj flankaj okupoj estis bone plenumitaj.

La batalo ne finiĝis. En la pasinta septembro, kiam la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ grave malsaniĝis, la karieristino Giang King denove venis al Daĝaj. Ŝi kolere diris al la Daĝaj-anoj: “Ĉu vi scias, ke pro kio mi venis? Mi venis por batali kontraŭ reviziismo!”

Ĉiuj scias, ke Daĝaj estas ruĝa flago starigita de Prezidanto Maŭ kaj la Daĝaj-anoj plej bone aŭskultas vortojn de Prezidanto Maŭ. Tamen Giang King kriaĉis, ke ŝi venis tien por batali kontraŭ reviziismo. Kia malica intenco! La



Nova fizionomio de Baj-ĵang-ju-brigado en Hijang-gubernio

fiago de Giang King forte indignigis la Daĝaj-anojn kaj ili decidis batali por defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj la ruĝan flagon Daĝaj.

Giang King tute ne atendis, ke la Daĝaj-anoj kuraĝas pleniĝi ŝian “kontraŭaeratakan tranĉeon” sur Hutoŭ-monto kaj riproĉe demandis sekretariinon de la partia filio de Daĝaj Guo Fenglian: “Kial vi konstruis tie porkostalon? Kial vi pleniĝis la kontraŭaeratakan tranĉeon sen sciigo al mi!?” Sekve do, sur la kapon de la Daĝaj-anoj verŝiĝis serio da kritikoj: “Vi estas influitaj de reviziismo”; “vi obeas la reviziistojn, sed ne min”; “vi fieriĝis en penso”; “vi postiĝis en politiko”. Ŝi eĉ kriis, ke ŝi serĉos ilian “postkulisman mastron”.

Guo Fenglian aplombe diris: “Ni Daĝaj-anoj ĉiam aŭskultas vortojn de Prezidanto Maŭ kaj faras pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ reviziismo. Se estas mankoj kaj eraroj en nia laboro kaj vi kritikis nin pro tio, ni modeste akceptos tion. Tamen ni ne povas akcepti vian kritikon ke ni obeas reviziistojn.”

Giang King povis trovi neniun vorton por refuti ŝian respondon. Fine ŝi provis subigi la Daĝaj-anojn per terura kulpigo, dirante, ke “tio estas problemo de politiko”, “problemo de linio” kaj postulis, ke Daĝaj skribu memkritikon kaj Guo Fenglian faru subskribon sur ĝi. Sed la Daĝaj-anoj tute ne obeis ŝin kaj neniun vorton ili skribis.

Kien ajn iris Giang King, tie ŝi faris intrigon. Foje dum rigardado al filmo, kiam Giang King aŭdis la vortojn el la parolteksto de la filmo “antaŭenpuŝite de la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo”, ŝi tuj alude diris al Guo Fenglian: “He, malgranda Guo, vi devas esti heroino antaŭ tiu slogano, sed ne lasu ilin bari vian vojon.” Guo Fenglian surpriziĝis. Kiun ŝi aludis per tiu “ili”? Ŝi ekpensis, ke Giang King provas serĉi “postkulisman mastron” en la problemo de la plenumo de la “kontraŭaerataka tranĉeo”, do ŝia ago celas ataki kaj spliti la Centran Komitaton de la Partio estratan de Prezidanto Maŭ! Guo


Fenglian travidis ŝian malican intencon kaj memoris en la koro ŝiajn krimojn.


Informiĝinte pri graviĝo de la malsano de Prezidanto Maŭ, la kadroj, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Daĝaj ne povis sin deteni de larmado pro dolorega malĝojo. Sed Giang King, ricevinte telefonon pri urĝigo de ŝia reveno, ankoraŭ montris sin bonhumora, kvazaŭ nenio okazus. Oni jam preparis por ŝi aŭton kaj trajnon por reveno, tamen ŝi ankoraŭ ludis karton. Nur post foj-refoja urĝigo ŝi ekiris.

Foriris Giang King, tamen la membroj de la partia filio de Daĝaj profunde konsciis, ke la batalo ne finiĝis kaj ĉiuj ili tre maltrankviliĝis: Kien sin direktos nia partio kaj ŝtato, se sukcesos la intrigo de la karieristino kaj konspiristino Giang King pri uzurpo de la plej alta gvidanteco de la Partio kaj ŝtato? Tamen ili firme kredis ke certe venkos la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj certe falos la karieristino.

Ĝuste kiel atendite, la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua frakasis la damnindan “kvarpersonan bandon” kaj komplete fiaskigis ilian intrigon pri uzurpo de la gvidanteco de la Partio kaj ŝtato kaj restaŭro de kapitalismo. La Daĝaj-anoj tre ĝojas pro tio kaj decidis klopodi por akiri novan venkon de la revolucio kaj produktado.

Traktoroj laboras sur kampo.





Montvilaĝo de deng-oj sur altebenaĵo

La montvilaĝo en malproksimo


Sur la Tibeta Altebenaĵo de nia lando loĝas la deng-oj kune kun la tibetanoj. Antaŭ la Liberiĝo, same kiel la tibeta popolo, ili longe suferis kruelan subpremado de la reaktia reganta klaso, vivis generacion post generacio en profundaj montoj kaj praarbaroj izolitaj de la ekstera mondo kaj terkulturis primitive. Post la Liberiĝo ili estis liberigitaj. Sub zorgado de la Partio kaj la registaro ili ŝanĝis la malriĉan kaj postĝintan fizionomion, disvolvis la produktadon tagon post tago kaj levis sian vivnivelon paŝon post paŝo. Post la popolkomunumigo, ili ekuzis traktorojn en plugado. En la lastaj jaroj, ili ĉefe kulturis tritikon kaj rizon, kaj samtempe ankaŭ ekonomiajn plantojn, ekzemple, teon kaj kuracherbojn por kontentigi vivbezono de la loka popolo. Antaŭenpuŝate de la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo en la tuta lando, ili senĉese plivastigis la plantareon, altigis la pohektaran produktokvanton, aplikis sciencajn metodojn kaj akiris riĉajn rikoltojn de ĉiuj agrikulturaj plantaĵoj en la lastaj sinsekvaj jaroj.

Han-a kadro helpas kaj lernigas
ilin en transplantado de rizidoj.



Traktoristo


Pluki tefoliojn





Plani por dis-
volvi agrikulturon

Rikoltado de tri-
tiko





Medicina taĉmento de ĈPLA ofte donas kurachelpon al deng-oj.



Vizito al petrol-havenoj

(daŭrigo)

de RAPORTISTOJ DE EPC

LA FORTO DE LA AMASOJ

Surpaŝinte la insulon Huangdaŭ ni jam eniris la terenon de la petrola haveno. Plejparto de la insuleto kun areo de malpli ol 5 kvadrataj kilometroj fariĝis areoj por administrejo kaj loĝejoj de la petrola haveno. Nur unu ŝoseo ligas la kontinenton kun la insuleto, kiu troviĝas je pli ol 200 kilometroj fore de Ĉangvej-subprovinco de Ŝandong al kiu ĝi apartenas, kaj 40 minutoj estas bezonataj por veturi de ĝi surmare al la urbo Kingdaŭ en la oriento.

La konstruado de la Huangdaŭ-a Petrola Haveno, same kiel konstruado de la aliaj petrolaj havenoj de nia lando, estis malfacila pro peza tasko, mallonga limtempo kaj nebonaj kondiĉoj. Por plenumi ĝin, ili sin apogis sur propraj fortoj kaj faris popolan militon.

Prenante la kolektadon, transportadon kaj aplikadon de granda kvanto da sablo kaj ŝtono en la konstruado kiel ekzemplon, Hia Kjuanĝong, respondeculo de la komandejo por konstruado de la petrola haveno, faris al ni vivecan prezentadon.

Tuj post la komenco de la konstruado de la surakva parto de la haveno, prezentiĝis urĝa bezono de pli ol 300,000 kubmetroj da sablo kaj ŝtono. Al la insuleto mankas tia materialo kaj

necesis kolekti kaj alporti tion de malproksime. Tiu giganta laboro evidente estus neplenumbla ĝustatempe, se oni atendus, ke la ŝtato alsendu specialan labortrupon kaj maŝinojn. La subprovinco Ĉangvej, kiu respondecis pri konstruado de la petrola haveno, decidis fari vastan propagandon inter la amasoj de la loko kaj mobilizis ilin por plenumi tiun taskon per siaj propraj fortoj.

Ĝuste tiam streĉe iris la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo. Sed koncernaj gubernioj kaj popolaj komunumoj elmetis la sloganon: "Ni bone plenumu ambaŭ taskojn de strebado por akiri riĉan rikolton kaj subteno de la konstruado de la haveno". Samtempe kun bona plenumo de agrikulturaj laboroj, pli ol 2,000 homoj estis senditaj en montaron por kolekti ŝtonon, eĉ instruistoj kaj lernantoj partoprenis en kolektado de gruzoj en postlecionaj horoj. La disponeblaj kamionoj ne sufiĉis por transporti la ŝtonojn, sekve aperis kolono de traktoroj kaj ĉevalĉaroj de la popolaj komunumoj sur la ŝoseo, kaj eĉ troviĝis vico de puŝĉaroj. Tio tre similis al scenoj en la jaroj de la revolucia milito, kiam kamparanoj transportis grenon kaj vestaĵojn per puŝĉaroj al la fronto por subteni la popolan armeon. Kiam oni komencis ĵeti ŝtonojn en la maron, la popolaj komunumoj alsen-

dis velŝipojn por helpo. Laŭ nekompleta statistiko, 160 traktoroj, 400 lignaj ŝipoj kaj 1,000 ĉevalĉaroj de la koncernaj gubernioj kaj komunumoj estis alsenditaj en la tagoj de streĉa konstruado.

Dank' al tio, antaŭdate plenumiĝis la tasko, pri kiu oni maltrankvilis timante malfruan plenumon de ĝi.


Nemalmultajn similajn okazojn ni aŭdis ankaŭ ĉe Dalian kaj Kinhuangdaŭ. Ni pririgardu la konstruadon de iu ŝoseo. Antaŭe, de Dalian ĝis la Blenia Golfo troviĝis nur mallarĝa gruza vojo. Por konstrui la novan havenon, miliono da tunoj da materialo devis esti transportata tra ĝi. Por ŝpari tempon, pli ol 5,000 homoj de la institucioj, fabrikoj, lernejoj kaj najbaraj komunumoj de la gubernio sub persona gvido de la sekretario de la partia komitato de Ginhian-gubernio komencis streĉe konstrui la vojon. Kaj fine ili sukcesis konstrui la 5-kilometran vojon en nur kelkaj tagoj.

Ankaŭ la granda kvanto da materialoj kaj ekipaĵoj, aŭ urĝe bezonataj aŭ malfacile pretigeblaj por la konstruado, estis liverita dank' al koncentra klopodo de mobilizitaj laboristoj de dekoj da fabrikoj. Ekzemple, 4,211 nenormaj

objektoj de 106 specoj bezonataj en la konstruado de la Petrola Haveno de Kinhuangdaŭ estis faritaj de 34 fabrikoj kaj minejoj. Interalie, la 33 kompletoj da precizaj kunigaj tubingoj estis kune faritaj de 19 fabrikoj kaj minejoj de la urbo.

Por konstrui la fundamenton de la petrola kajo de Huangdaŭ, granda kvanto da ŝtaltubaj palisoj estis bezonata. Tiuj ŝtaltubaj palisoj estis kune prilaboritaj de kelkaj fabrikoj de Ŝandong-provinco. Ni pririgardis unu el ili, nome la prilaborejon de la instala kompanio de la provinco. Ĝi havas nur iom pli ol cent laboristojn kaj kelkajn malgrandajn fabrikajn domojn. Por ĝi estis malfacile plenumi tian laboron pro nesufiĉeco de ekipaĵoj kaj teknika forto. Sed la laboristoj kun fortega volo decidis lerni la spiriton de Daking kaj preni sur sin la ŝarĝon de subtenado al la konstruado de la petrola haveno. Ili elfaris simplajn ekipaĵojn kaj komencis fabrikadon subĉiele. Resumante sian sperton en praktikado, ili plibonigadis sian laboron kaj en ĝusta tempo elfaris pli ol 1,100 tunojn da ŝtaltubaj palisoj kun norma kvalito.

Dum la konstruado de tiu petrola haveno, pli ol 40 fabrikoj kaj entreprenoj de la tuta pro-



Parto de la Huangdaŭ-a Petrola Haveno

vinco aktive fabrikis, sub la unueca direktado de la havenokonstrua departemento de Ŝandong-provinco, grandan nombron da ekipaĵoj, kaj pli ol 160 unuoj de pli ol 20 provincoj kaj urboj de la tuta lando donis al ĝi fortajn helpojn en homfortoj kaj materio.

“HAVENMANIULO”

En la petrolaj havenoj ni aŭdis multajn kromnomojn de konstruantoj, kiuj aparte interesis nin, kiel ekzemple “Havenmaniulo”, “Maljuna Bovo”, “Tigrida Grupo” kaj “Ferknabina Grupo”. Post pridemando ni informiĝis, ke ĉiu el tiuj nomoj prezentas multajn kortuŝajn farojn kaj brilas de valorega mastra spirito de la konstruantoj.

La nomo “Ferknabina Grupo” portas la laŭdon de Huangdaŭ-aj laboristoj al la revolucia volo kaj perfekta tekniko de la Surakva Betonmeta Grupo de Knabinoj. Tiu grupo havis 16 membrojn, el kiuj la plej aĝa havis 26 jarojn kaj la plej juna 22 jarojn. Iuj el ili ĵus forlasis sian lernejon, dum aliaj estis intelektaj junulinoj irintaj al kamparo. La plejparto el ili ne nur nenion sciis pri konstruado de haveno sed ankaŭ neniam vidis maron. En la komenco ili vomis surŝipe eĉ kiam ne estis ondegoj, kaj starante sur la labora platformo ili sentis timegon pro la ruliĝantaj ondoj sub la piedoj. Tamen neniu el ili retiriĝis. Ni demandis ilin, kiel ili venkis la malfacilojn. Brue ridante ili respondis: “Dank’ al zorga instruado de la spertaj laboristoj!” “Ĉiuj tiel energie laboras sur la konstruejo, ĉu ni povus cedi al malfaciloj pro timo?” Ili ŝajnis kvazaŭ ili renkontus nenian malfacilon. Fine la grupestrino Li Ĉunmej diris: “Nemalmultajn malfacilojn ni renkontis kaj iuj el ni eĉ ploris. Sed pensante ke nia patrolando nun havas petrolon kaj tamen ne povas ĝin transporti al la bezonantoj, ni tre maltrankviliĝis kaj sentis ke pezas granda ŝarĝo sur niaj ŝultroj! Ni do firme decidis venki la ĝenon de la ondoj kaj plenumi la taskon de metado de betono.” Dank’ al obstina kaj persista klopodado ili alkiutimiĝis al la surmaraj laborkondiĉoj kaj ellernis betonmetadon sur akvo. Malfluso estas oportuna tempo por meti betonon surakve. Por gajni



Teknikistoj sur la konstruejo

tempon, ili faris preparadon antaŭtempe ĉu en tago aŭ en nokto, kaj ascendis la laboran platformon tuj je komenciĝo de malfluso. Anstataŭ timi nun ili ekamas la maron. Post penlaborado en kelkaj monatoj, ili bonege plenumis la ĉefajn betonmetajn taskojn de la kajo kaj pilieraj supraĵoj. La grupo de Li Ĉunmej estis honore titolita de la supera instanco “Ferknabina Grupo”.

El la konstruantoj, kiuj amegas sian laboron, ni devas iom paroli pri la “Havenmaniulo”. Li estas unu el la admirindaj veteranaĵ laboristoj renkontitaj de ni.

Li propre nomiĝas Vang King-jun kaj estas estro de ĉarpentista grupo kaj avangarda laboristo en la konstruado de la Petrola Haveno de Kinhuangdaŭ. Li jam estas 64-jara kaj devus emeritiĝi antaŭ longe. Sed ĉiufoje kiam gvidantoj kaj kamaradoj ekparolis pri lia emeritiĝo, li diris: “Bedaŭrinde mi faris ankoraŭ tro malmulte. Mi volas labori ankoraŭ kelkajn jarojn.” Kun tia penso li bataladis tutjare sur la havena konstruejo, kun la junaj grupanoj sub sia gvido.

De kie venis lia granda entuziasmo? Ni citu parton de lia parolo:

“Mi naskiĝis en familio de malriĉa kamparano de iu vilaĝo de Henan-provinco. Laŭ mia memoro, mi neniam manĝis sate antaŭ la Liberiĝo. En mia 16-jara aĝo mi forlasis la hejmvilaĝon



Profesoro Kian Linghi (la meza) de la Dalian-a Politekniko sur la konstruejo

por trovi vivrimedon. En 1940 mi venis al Tianjin kaj fariĝis havenkonstrua laboristo. En tiu tempo, mi kun ĉifono sur la korpo devis penlaboregi tage kaj nokte, eĉ kiam neĝegis kaj blovis frosta vento. Por ŝtopi mian stomakon mi havis nur fabrekrementon kaj glanfarunon. Mi loĝis en matobudo sur marbordo. La laborkondiĉoj estis terure malbonaj. Dum konstruado de kajo, laboristoj devis transporti per puŝaroj ĉiufoje pli ol 300 kg. da ŝtono tra provizora mallarĝa ponto al la ŝtonamaso en maro. Por konstrui unu kajon, sennombraj homoj devis oferi sian vivon. Kaj post la finkonstruo de la kajo, grandaj kapitalistoj kaj imperiistoj avide forrabis per ĝi riĉaĵojn de la ĉina popolo. En tiu tempo mi eĉ songis, ke ni fiere konstruas niajn proprajn kajojn post faligo de la reaktiularo.

“Fine alvenis la tago atendita. Je la liberiĝo de nia patrolando en 1949 ni fariĝis mastroj de la ŝtato. Sub la edukado de la Partio, mia klasa konscio pli kaj pli altiĝis. Mi pensis, ke nian feliĉan nunon ni devas danki al la gvido de Prezidanto Maŭ. La feliĉo estas malfacile akirita,

do mi devas tutkore laboregi por socialismo! En la pasintaj pli ol 20 jaroj, mi partoprenis en haven-konstruado de Dalian, Kingdaŭ, Tiangin, Ŝanhajo, Kantono, Ĝangiang kaj Hajnan en norda kaj suda Ĉinio, kun ĉiam pli granda entuziasmo.”

En 1973, kiam Vang King-jun informiĝis, ke la unua petrola haveno de nia lando estos konstruita en Kinhuangdaŭ, li tuj sin anoncis por partopreni en la konstruado. Tie li ĉiutage eliris frue kaj revenis malfrue, ofte laboris nokte post la deĵorado kaj neniam petis forpermeson. Li meminciate oferis siajn feriojn por multe kontribui al la konstruado de la haveno.

Sub la gvido de Vang King-jun, ĉiuj membroj de la ĉarpentista grupo laboris unuanime, bone konservis kaj uzis la pli ol 20,000 lignajn tabulojn, pli ol 10,000 ŝraŭbojn kaj ŝraŭbingojn por muldado de kasonoj kaj garantiis la produktadon.

Fari pli da kontribuo per siaj manoj al la konstruado de petrola haveno de la patrolando estas nur unu el la motivoj de la prokrastado de la emeritiĝo de Vang King-jun, kaj krome li ankaŭ havas noblan volon, nome eduki pli multajn junajn laboristojn laŭ la bezono de la revolucio. Lia grupo konsistis el 15 laboristoj, kiuj ĉiuj estis junaj metilernantoj escepte de li. Vang King-jun pensis, ke tiuj junuloj naskitaj en la nova socio ne ricevis penigan hardadon en ideologio kaj bezonas altigon en tekniko, li nepre devas helpi la partian organizon kulturi ilin en daŭrigantojn de la revolucia afero. Li timis nek ŝarĝon de zorgoj nek ĝenojn, ĉiam donis bonajn ekzemplojn per siaj faroj al la junuloj por ke ili heredu bonajn revoluciajn pensojn, tradicion kaj laborstilon.

En la pasintaj multaj jaroj, foje kaj refoje ŝanĝiĝis la membroj de la grupo de Vang King-jun, multaj el ili aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio, nemalmultaj el ili fariĝis grupestroj aŭ sekciestroj kaj ankaŭ ili fariĝis “havenmanuloj”.

NOVAJ PILIEROJ EMERĜIS EL MARO

Finante nian raporton pri la konstruado de petrolaj havenoj ni donu kelkajn faktojn por

respondi demandon ĝenerale interesan koncerne al tiu afero: Kiel iras la administrado de la petrolaj havenoj post ilia ekfunkcio?

Ĝis decembro de 1976, la Petrola Haveno de Kinhuangdaŭ jam funkciis tri jarojn. Unu el ĝiaj administrantoj ĝoje diris al ni, ke la elporta kvanto de la haveno kreskas ĉiujare. Tiu de 1976 pliiĝis je 55% kompare kun tiu de 1974, kaj tiu de 1976 pliiĝis je 27% kompare kun tiu de 1975. La totala sumo de profito liverita de la haveno al la ŝtato jam superis la sumon investitan de la ŝtato por ĝia konstruado. La elporta kvanto de la Petrola Haveno de la Dalian-a Nova Haveno kreskis ĉiumonate ĝis la fino de 1976. Ankaŭ tiu de la Huangdaŭ-a Petrola Haveno kreskas senĉese.

La stabila kreskado de la elporta kvanto de la petrolaj havenoj pruvis, ke ili estas bonkvalitaj kaj bone funkciantaj. Ilia efektiva funkciado montris, ke la projektitaj kapacitoj estis superitaj. Ĉe Huangdaŭ ni vidis propraokule ke ĉe ankrejo por ŝipo de 50,000 toneloj ankris nia oceana petrolŝipo Danhu kun kapacito de 90,000 toneloj. Ankaŭ ĉe la havenoj de Dalian kaj Kinhuangdaŭ okazis similaĵoj.

Por tia provo ne nur la kajo devas esti firma kaj povas elteni grandan premon, sed ankaŭ la administrantoj devas esti taŭgaj. Ĉar la ĉinaj petrolhavenaj administrantoj estas de la unua generacio, ankoraŭ mankis al ili sperto. Sed sub la edukado kaj kulturado de la Partio, ili senĉese altigis sian respondecon kaj laboris kun zorgemo por bone administri la havenon kaj atingis bonajn sukcesojn, ĉiam imitante la ekzemplon de la Daking-anoj.

Nun, post la faligo de la "kvarpersona bando" de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ fare de la tutlanda popolo sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng, la situacio de la petrolaj havenoj, same kiel tiu de la aliaj frontoj de nia lando, estas tre bona. Ĝuste kiel iu laboristo skribis en sia dazibaŭ-o: "En la pasinteco la 'kvarpersona bando' kalumniis nian energian laboradon por socialismo kiel praktikon de 'teorio de produktaj fortoj', kun la vana espero subfosi la revolucion kaj produkta-

don. Plenumante la revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj obeante la instrukciojn de Ĉefministro Ĝou, ni agis kontraŭ ili kaj sukcese konstruis la petrolan havenon. Nun post faligo de la 'kvarpersona bando' malaperis la obstaklo sur nia vojo, kaj ni povas laboregi plenenergie."

Ĉifoje ni vidis ĉe Kinhuangdaŭ, ke en la ekstera flanko de la petrolkajo aperis alia longa digo kaj vico da pilieroj apenaŭ emerĝintaj el la akvo. Laboranto de la komandejo diris al ni, ke tio estas objekto por la dua konstrua periodo de la petrolo kajo. Post finplenumo de tiu konstruado komencita en 1975, alia ankrejo por 50,000-tonela ŝipo aldoniĝos al la petrolo haveno.

Ni informiĝis, ke kun la apero de nova alta tajdo de la industria kaj agrikultura produktado, multaj havenoj nun planas siajn novajn konstruajn objektojn.

"Malfaciloj povas aperi sur nia vojo, sed tion ni ne timas. Dank' al la gvido de la Partio kaj disvolvo de la fortoj de la amasoj, ni certe povos venki la malfacilojn kaj plenumi niajn taskojn!" Aŭdinte tiujn firmajn vortojn, ni vidis per la animaj okuloj grandegan armeon de konstruantoj transformantaj monton kaj maron.

En lernado



Ĝaŭ Lanjing—modelo de bredado de silkraŭpoj

En Ĉinio troviĝas multaj specoj de silkraŭpoj, el kiuj tiuj nutrataj per folioj de morus- kaj kverk-arboj havas altan ekonomian valoron. La silkraŭpoj bredataj de la fame konata modelo Ĝaŭ Lanjing estas tiuj nutrataj per folioj de morusarbo.

La virina grupo sub la gvido de Ĝaŭ Lanjing aplikas sciencan metodon en bredado, dank' al kio ĝi fariĝis unu el avangardaj unuoj de silkraŭpa bredado de la tuta lando. En la jaro 1975, Ŝifo-brigado de Ŝandong-provinco, kie Ĝaŭ Lanjing laboras, produktis 10,050 kg. da kokonoj, t.e. respektive 4-oblo kaj 20-oblo de tiuj antaŭ la kultura revolucio kaj en la komenca periodo post la Liberiĝo. La produktokvanto de kokonoj en la jaro 1976 atingis 12,000 kg.

La bredado de silkraŭpoj de Ŝifo-brigado havas longan historion. Sed ĝia produkto longe stagnis kaj iam eĉ reduktiĝis en la pasinteco. Nur post la liberiĝo en la jaro 1947 tiu afero disvolviĝis iom post iom. Malriĉkamparana filino Ĝaŭ Lanjing komencis okupiĝi pri bredado de silkraŭpoj en la jaro 1953. Tiam multaj agrikulturaj kooperativoj de la gubernio sendis siajn reprezentantojn al ŝi por lerni ŝian sperton, ĉar la silkraŭpoj breditaj de ŝi donis multajn kokonojn. En la jaro 1957, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj elektis ŝin por ĉeesti la Tutlandan Kongreson de Laboraj Modeloj. Prezidanto Maŭ intime akceptis la reprezentantojn, kaj tio donis grandan edukon kaj kuraĝigon al Ĝaŭ Lanjing. En la sekvinta jaro ŝi fondis la virinan grupon de Ŝifo-brigado por

bredi silkraŭpojn kaj decidis liveri pli multe da kokonoj al la ŝtato.

Dank' al klopodado de la grupo kaj komunumanoj, la produktado senĉese disvolviĝis, kaj la produktokvanto de kokonoj de la brigado en la jaro 1969 atingis ĉ. 5,000 kg. La grupo de Ĝaŭ Lanjing faris eksperimentadon pri nutrado de silkraŭpoj per morusarbaj folioj kun aldonita akvo kaj akiris iom da sperto. Tio malfermis novan vojon al stabila kaj alta produkto de kokonoj.

Zorgema flegado



En la malnovaj silkraŭpobredaj regionoj estis malpermesite nutri silkraŭpojn per akvumitaj morusarbaj folioj, nome la silkraŭpoj ne devis tuŝigi kun akvo. Sub la gvido de Ĝaŭ Lanjing, la grupanoj varme diskutadis pri tiu problemo, en ligo kun la klimataj karakterizaĵoj de norda Ĉinio kaj multjara breda praktikado. Ili pensis pri afero okazinta en la jaro 1964: Printempe de tiu jaro abundis pluvoj, tial la silkraŭpoj ofte manĝis foliojn deŝiritajn en pluvado. Tiam iuj timis, ke ili malsaniĝos kaj produktos malmulte da kokonoj, pro manĝo de akvumitaj folioj. Tamen en tiu jaro oni akiris riĉan rikolton de kokonoj maloftan en nia lando.

Pro kio? Ili venis al jena konkludo: La silkraŭpo similas al sako plena je akvo suĉita el la morusarbaj folioj. En tiu regiono estas malmulta pluvo kaj la morusarbaj folioj enhavas ne sufiĉe da suko. La problemo povas esti solvita, se oni aldonas certan kvanton da akvo al la folioj.

Por pruvi ĝustecon de la konkludo, Ĝaŭ Lanjing kaj ŝiaj grupanoj faris jenan eksperimenton: Iuj silkraŭpoj estis nutrataj per folioj aspergitaj per akvo, kaj aliaj per folioj sen aldonita akvo. La rezulto montris, ke la unuaj silkraŭpoj donis grandajn kaj bonkvalitajn kokonojn en pli granda kvanto. Poste tiu sperto estis disvastigita.

La alia atingo de la grupo de Ĝaŭ Lanjing estas tio, ke ĝi sukcesis generadi silkraŭpojn kelkfoje en unu jaro anstataŭ unufoje. En la komenco de la eksperimentado iuj opiniis, ke estas multaj malfaciloj por fari tion, ĉar la vetero estas ŝanĝiĝema kaj ne estas sufiĉe da morusarbaj folioj por tiel longa nutrado.

Ĝaŭ Lanjing kaj aliaj tamen opiniis, ke la malfaciloj estas venkeblaj. Somere kaj fruaŭtune ili malaltigas la temperaturon per malfermo de la pordoj kaj fenestroj, surmeto de malsekigita tolo kaj ŝprucigo de malvarma akvo por havigi normalan temperaturon al silkraŭpoj. Por solvi la problemon de manko de morusarbaj folioj ili klopodas por multe planti kaj bone flegi morusarbojn. En la kultura revolucio la grupo de Ĝaŭ Lanjing kulturis pli ol 10 novajn speciojn

de morusarboj, grefti nombron da morusarbidoj, kaj samtempe plivastigis la areon de morusarba ĝardeno je 13 hektaroj sur dezerta montodeklivo. La brigado nun povas liveri sufiĉe da folioj al si mem, sed ankaŭ helpi fratajn guberniojn, komunumojn kaj brigadojn per pli ol 30,000 morusarbidoj. En la jaro 1975, la grupo generadis silkraŭpojn respektive en printempo, somero, fru-aŭtuno, mez-aŭtuno kaj malfru-atŭtuno kaj ĉiufoje akiris riĉajn rikoltojn de kokonoj.

La grupo faris eksperimentadon pri pli ol 30 temoj sinsekve en bredado de silkraŭpoj. Iuj el iliaj spertoj estas jam disvastigitaj ne nur en iliaj sed ankaŭ en aliaj gubernioj kaj komunumoj. En la jaro 1970, Ĝaŭ Lanjing fariĝis kumula instruisto de la Agronomia Instituto de Ŝandong-provinco.

La disvolviĝo de silkraŭpa bredado de Ŝifobrigado akcelis la produktadon de greno, senĉese firmigis kaj fortigis la kolektivajn ekonomion. En la lasta jaro ili venkis katastrofojn de hajlo kaj malalta temperaturo kaj akiris riĉan rikolton de greno kun la hektara produktokvanto de 6,997 kg.

Ĝaŭ Lanjing (la dua de dekstre) interŝanĝas sperton pri bredado de silkraŭpoj kun siaj grupanoj.



Laŭplana naskolimigo en Ĉinio

EN la sanprotekta stacio de la loĝantara komitato de Tun-gjuan-strateto de Pekino, ĝia estrino Guan Ĝikin estis kopianta naskoligan karton de laboristino 36-jara, kiu ĵus ricevis steriligan operacion tuj post la nasko de sia dua infano. La dua naskito estas knabo. Sia unuenaskita infano jam estas 6-jara. Antaŭ sia dua gravediĝo ŝi praktikadis kontraŭkoncigon sub direktado de la stacio kaj regule vizitadis ĝin por ricevi kontraŭkoncipaĵojn senpage.

Krom preventado de malsanoj kaj kuracado de negravaj malsanoj al la pli ol 600 familioj la nomita stacio zorgas ankaŭ naskolimigadon al ili. Ĝi tenas naskolimigajn kartojn de 364 naskaĝaj virinoj. Sur ĉiu karto registriĝis la aĝo, nasko-

fojoj kaj aplikata kontraŭkoncipa metodo de la koncerna virino. La stacio havas 6 sanitaristojn, kiuj laboras sub helpo de postlaboraj propagandantoj de laŭplana naskolimigo. En difinita tempo ili vizitas naskaĝajn geedzojn por propagandi la signifon de laŭplana naskolimigo kaj liveras al ili kontraŭkoncipaĵojn. Ĉar ili ĉiuj estas najbaroj, ili povas interparoli intime kaj libere. En 1976, naskiĝis sume nur 12 infanoj al la loĝantoj de tiu strateto.

En Pekino, troviĝas pli ol 800 tiaj sanprotektaj stacioj, kiuj konsistigas parton de la reto por laŭplana naskolimigo de la urbo. Kaj tiu reto inkluzivas ankaŭ la kuracejojn de la institucioj kaj fabrikoj kaj ĉiujn hospitalojn.



Kuracistino konigas al akuŝistinoj sciojn pri kontraŭkoncipo.

La laŭplana naskolimigo de Ĉinio iras laŭ la principo de kombino de la ŝtata direktado kaj la volonteco de la amasoj. Dank' al la laŭplana naskolimigo malaltiĝis jaron post jaro la procento de natura kresko de la ĉina loĝantaro kaj en nemalmultaj regionoj elstara sukceso estas atingita. La procento de natura kresko de la loĝantaro de Ĝiangsu-provinco estis respektive 27.4 milonoj en 1965 kaj ĉ. 11 milonoj en 1976.

La politiko de laŭplana multigo de la loĝantaro en Ĉinio estas aplikata ne pro "superloĝateco" kaj "loĝantara eksplodo". Ĉinio estas disvolviĝanta socialisma lando, kies nacia ekonomio disvolviĝas laŭplane, do ankaŭ ĝia loĝantaro devas kreski laŭplane.

En dense loĝataj regionoj de Ĉinio malfrua geedziĝo kaj naskolimigo estas aplikataj, sed en maldense loĝataj regionoj de nacimalplimulto kaj aliaj regionoj oni alprenas rimedojn por akceli la kreskon de la loĝantaro.

Diversnivela medicinaj institucioj de la urboj kaj kamparo instalas en si apartan klinikan sekcion por laŭplana naskolimigo kaj sendis kuracistojn de la urboj al kamparo por senĉese altigi la teknikan nivelon de la ticaj sanitaristoj. Multaj komunumaj hospitaloj povas fari kontraŭkoncipajn operaciojn, kiel ekzemple enmeti kaj elpreni kontraŭkoncipan ringon kaj ligi salpingon kaj spermodukton. Eĉ multaj nudpiedaj kuracistinoj de produktaj taĉmentoj povas enmeti kaj elpreni kontraŭkoncipan ringon en la hejmo de komunumanoj.

La ŝtato liveras kontraŭkoncipilojn senpage. Naskolimigaj operacioj inkluzive de tiuj por steriligo kaj abortigo estas senpage riceveblaj. Post tia operacio oni povas ricevi libertempon kun salajro aŭ subvencio.

Laŭplana naskolimigo ne nur utilas al la sano de la patrinoj kaj infanoj, sed ankaŭ ebligas al pli multaj virinoj labori. Samtempe kun praktiko de naskolimigo, ĉie oni pluapaŝe fortigis la sanprotektadon al virinoj kaj infanoj por garanti sanan vivadon de ĉiu naskito.

Por ke laŭplana naskolimigo estu konsciencie praktikata de la amasoj, koncernaj gvidantoj tre



"Nudpieda" kuracistino en la kamparo

atentas la propagandan laboron. Krom milionoj da postlaboraj propagandantoj inter la amasoj, propagandaj grupoj ofte faras propagandon pri laŭplana naskolimigo en bazaj unuoj per ekspozicioj, ĵurnaloj, libroj, radio, lumbildoj, teatraĵoj ktp. Estas dezirate, ke ĉiu geedza paro havu du infanojn naskitajn je tri aŭ kvar jaroj unu post la alia.

Propagandata estas ankaŭ malfrua geedziĝo. Antaŭ la Liberiĝo, gejunuloj de la ĉina kamparo ordinaro geedziĝis en la aĝo de 15-16 jaroj, dum hodiaŭ la viroj en la aĝo de 25 jaroj kaj la virinoj en la aĝo de 23 jaroj, kaj en urboj la geedziĝa aĝo estas iom pli granda. Tio ebligas al gejunuloj uzi pli multan energion por lernado kaj laboro.

La movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, komencita en 1974, forte antaŭenpuŝis la disvolvon de laŭplana naskolimigo. Ĉar en tiu movado, la malnova ideo ke "la viroj estas noblaj kaj la virinoj malnoblaj" predikita de Konfucio antaŭ pli ol 2,000 jaroj esits kritikita. En la pasinteco multaj homoj deziregis havi filon eĉ post ricevo de pluraj filinoj, sed nuntempe eĉ en la kamparo nemalmultaj naskipovaj geedzoj ne volas naski plu post ricevo de du filinoj.

Serva grupo de ruĝgardianetoj

EN iu fervoja stacio aro da “malgrandaj servistoj” streĉe faras sian servon. Iuj el ili portas pakaĵojn por pasaĝeroj, aliaj subtenas maljunulojn, triaj deĵoras por garantii bonan ordon de la stacio kaj kvaraj faras purigadon.

Ili estas membroj de la Ruĝgardianeta Grupo de la Canggin-a Elementa Lernejo de la urbo Vuhu en orienta Ĉinio fondita antaŭ 14 jaroj. Lernante la spiriton de Lej Feng — bona batalanto de Prezidanto Maŭ, la grupanoj tutkore donas siajn helpojn al pasaĝeroj en la stacio post siaj lernohoroj.

Inter amasoj cirkulas multaj rakontoj pri iliaj bonfaroj.

Iun vesperon de la pasinta junio, pluvis senĉese. Apenaŭ lernantino Kian Vejhiu atingis la pordon de la stacio, ŝi trovis, ke iu virino portas vojaĝsakon en unu mano kaj infanon en la alia brako, apud ŝi staras knabineto kaj iliaj vestoj estas malsekigitaj de la pluvo.

Kian Vejhiu tuj alpaŝis kaj malfermis sian ombrelon por ili. Informiĝinte ke ili volas veturi per vagonaro al iu gubernia urbo, Malgranda Kian pensis en si: La trajno jam forveturis, kaj ili devas atendi ĝis morgaŭ. Kie ili tranoktu hodiaŭ? Mi nepre devas helpi ilin solvi la malfacilon.

Tiam Malgranda Kian ekmemoris la bonfaron de Onklo Lej Feng, kiu foje akompanis nekona-tajn maljunulinon kaj infanon al la celloko en pluvado, kaj tio ŝin inspiris.

Tenante ombrelon en unu mano kaj la vojaĝsakon de la virino en la alia, ŝi venis kun ili al sia lernejo kaj raportis tion al instruistoj. La instruistoj varme akceptis ilin: Iuj portis akvon por ke ili lavu al si la vizaĝon kaj aliaj pretigis por ili litojn. Tuj poste Malgranda Kian alportis manĝaĵon el sia hejmo.

Tagmeze de la sekvinta tago, Malgranda Kian akompanis ilin al la stacio. La virino prenis la manojn de Malgranda Kian kaj diris emocie: “Vi ja estas bona knabino de Prezidanto Maŭ. Dankon!”

Malgranda Kian diris ridetante: “Tio estas farenda por mi kaj ne indas dankon.”

La ruĝgardianetoj revenis hejmen ofte en malfrua vespero pro multaj servoj en la stacio. Iun vesperon, kiam Ĝu Akiang estis preta hejmenreveni por vespermanĝo, subite li vidis sur la kajo pasaĝerinion en laborista vesto, kiu senpacience streĉas sian rigardon por serĉi iun. Apud ŝi staris lignokesto kaj ferrado. Ŝajne ŝi ĵus elvagoniĝis kaj atendis homon, kiu devis veni por helpi ŝin en portado de la objektoj. Malgranda Ĝu decidis ŝin helpi.

Ĝuste en tiu tempo venis alia kunlernanto, kaj ili kune helpis ŝin en portado de la kesto kaj pakaĵo. Kiam ili atingis la fabrikon de la laboristino, jam vesperiĝis.

Rigardante la du ŝvitantajn knabojn, la laboristino demandis, kiel ili nomiĝas, sed ili forkuris senresponde.

Huang Ŝufu, lernanto de la kvara klaso, ofte propagandis al pasaĝeroj trafikan regularon kaj helpis policianojn teni ordon de la stacio.

Iun tagon, kiam Huang Ŝufu kaj aliaj kunlernantoj preterpasis la kajon revenante hejmen de la lernejo, vartrajno alkuris vid-al-vid. En tiu momento iu knabo 4-5 jara estis transironta la fervojon. Riskante sian vivon, Malgranda Huang sin ĵetis al la knabo kaj tiris lin for de la fervojo.

La knabo eldanĝeriĝis kaj la trajno sekure preterpasis. Homoj kiuj vidis la okazaĵon iris al Huang kaj laŭdis lian bravecon. Rigardante la

savitane knabon kaj forkurantan trajnon li ekridetis de ĝojo.

Forpasis la novjaro, kaj la kunlernantoj estis sin preparantaj por ekzameno. Ĝuste tiam neĝego kaj neordinara frosto atakis la lokon. Posttagmeze de iu tago, ruĝgardianeto Guo Fahiang volis iri al la stacio post la plenumo de la ekzercoj. Sed konsiderante, ke sur la kajo amasiĝis neĝo, kio certe kaŭzis multan maloportunon

al pasaĝeroj, ŝi tuj iris kune kun aliaj kunlernantoj al la stacio antaŭ la fiksita horo. La kajo estis rapide purigita de ili.

Kiam ili finis sian servon al la lasta grupo da pasaĝeroj, jam estis malfrua horo. Reveninte al sia hejmo, Malgranda Guo persiste finplenumis sian lernan taskon.

En la fino de lernojaro Malgranda Guo perfekte trapasis ekzamenojn de ĉiuj lernoobjektoj.

Novaj Esperantaj Eldonaĵoj de Ĉinio:

Ruza Griza Lupego (88 Es-135p)

Tiu ĉi bildrakonta libro por infanoj temas pri blankaj leporoj kaj lupoj. Iun belan tagon du leporoj kolektas sovaĝajn florojn sur kamparo. Griza lupego ekvidas ilin kaj deziras tuj formanĝi ilin. Ĝi provas trompi la du leporojn. Sed fine ĝia intrigo estas malkaŝita, kaj la leporoj batmortigis la grizan lupegon helpate de siaj geamikoj.

26 koloraj bildoj 16 × 18 cm.

Prezo: £ 0.08 US\$ 0.20 FF1.10 DM 0.08



Liu Venhjue (88 Es-137)

Tiu ĉi bildlibro por infanoj rakontas pri tio, ke en 1959 14-jara juna pioniro Liu Venhjue, en Siĉuan-provinco brave batalis kontraŭ subfosado de bienulo kaj oferis sian junan vivon por defendi la interesojn de la popola komunumo. Ĝi prikantas la noblan virton de la heroeto Liu Venhjue varme ami socialismon, prizorgi la kolektivon, volonte helpi aliajn kaj kuraĝe batali kontraŭ la klasa malamiko.

46 koloraj bildoj 16.2 × 18.4

Prezo: £ 0.15 US\$ 0.40 FF 1.90 DM 1.50 cm.




LIU VENHJUE

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Generala Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio

Mendu ĉe nia peranto vialoke, aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



Printempa Tajdo

de LI JING

*Malĝojajn larmojn deviŝinte,
forsendis ni la lastan nokton de la vintro,
en kiu nin forlasis Prezidanto Maŭ;
viŝante l' ĝojajn larmojn
ni vidas la unuan mateniĝon de printempo
sub gvid' de Prezidanto Hua.
Ho, la 1977-an jaron, en Ĉinio
sur norda vasto —
kampar' kovrita de glaci' kaj neĝo,
en sudo —
verdaj akvokampoj ĉirkaŭ urboj.
Ĉe bordoj de riveroj serpentumaj,
en sino de centfaldaj montoj,
jen bruas paŝoj,
henas ĉevaloj,
teron tremigas radoj,
resonas la ĉielo de tamburoj kaj trumpetoj.*

*Kaj post la fajre ruĝaj flagoj
batalaj
sin kaŝas kia sceno
entute!
Kiel impetan tajdon de printempo
ja levis ili!*

*En la aŭtun' neforgesebla de 1975,
post la kunven' por lerni de Daĝaj
flamegis ĉiu en la koro
tiel en Sud' kiel en Nordo!
Tamburoj bruis kvazaŭ ĉevalhufoj,
kaj kantoj fluktuadis kiel ondaj plaŭdoj,
sed ĝuste tiam
iuj eksvingis glavon kun kriaĉoj:
La voj' eraras!*

Oblikvas la linio!

En iuj lokoj
ekhaltis la rulad' tambura,
kaj estis sufokita la kantado,
ramado ĉesis,
martel' ripozis.
Aŭdiĝis en mallumo
du tri rikanoj nur . . .

Nun pli ol unu jar' forpasis,
la "kvarpersona bando" falis,
kaptitaj la diabloj.
Okazis jam denove
kunven' por lerni de Daĝaj.
Nun antaŭ ni
la mondo helas, sternas sin aŭror' sur nia vojo!
Post alia
batalo animskua
nia popol' fariĝis pli solida,
pli riĉidea kaj kreiva;
triole plibeliĝas nia panoramo
ol en la pasinteco.
Jen neĝaj flokoj kirligantaj en l' aero
kaj ŝtormo, kiu povus fendi kaj disŝiri nian
mondon,
ne povas ja sufoki l' sonoradon
vokantan al laboro
nek la kantadon kaj konkursan tamburadon!
Rigardu en profundon de neĝblovo:
nia Partio,
niaj klasfratoj
kaj niaj tigre viglaj popolanoj
rapide kuras
sub gvid' de Prezidanto Hua,
portante en la sino l' bluan planon

ellaboritan de Prezidanto Maŭ dum sia vivo.

La viroj kaj virinoj,
junuloj kaj aĝuloj
flamiĝas de fervoro
kaj ŝvitas kun vaporo.
Ho, en Ĉini' l' antikva tamen juna,
en neĝ' kaj nubvualo,
batalas kiom da soldatoj
kun bataliloj glime flagraj!
Sur la ruin' de l' historio
kaj la skafaldo de socialismo
l' entuziasmo de impeto
ardigis ĉiun sekundeton!
Amiko,
aŭskultu vi: ĉi tie
en la printempa ĉarmo
eĉ kantos tiuj,
kiuj ne lertas kanti,
kaj laŭte ridos ankaŭ tiuj,
kiuj ne emas tion fari.
Eĉ pigo sur matena branĉo ŝajne
en nova tono krias!
Jen la printempa
bolanta scen' de l' ĉina tero,
jen bild' de l' hodiaŭa vivo
de la popolo ĝia!

Komence de la Granda Muro ĝis la fin' de l'
Rivero Flava,

buntaj kaptukoj de knabinoj
kaj felaj ĉapoj de aĝuloj brilas.
Ĉie surkampe
leviĝas kvazaŭ fajro en ventego
la kanto pri lernado de Daĝaj!
Ja kie vi ne vidas

brilantajn sokojn!
brulantajn pioĉojn kaj ŝpatojn!
Ja kie ne kuregas ĉaroj kaj ĉevaloj printempon
urĝantaj!

Ja kie ne troviĝas ĝoj-informoj !
En la vilaĝo orienta
la gejunuloj de l' traktora riparejo
viŝadas kaj kontrolas la maŝinojn.
Jam estas forsenditaj iuj por ripari vojon,
aliaj por fortigi ponton.
Ho, en kaj ekster staloj
bovidoj muĝas kaj petole saltas ĉevalidoj,
ĉaristoj ĝoje provas sian novan vipon
kaj la bredist' riparas jungilaron. . .
En la vilaĝo okcidenta,
en grentenej' onklinoj, bofratinoj
selektas zorge novajn bonajn semojn;
en la popola komunumo oni urĝe telefonas:
Tuj sendu homojn por transporti kemisterkon!
Tuj sendu ĉaron por akcepti insektmortigilon!
Lige kun lerno de Daĝaj la plan' produkta
jam estas ripetade diskutita
kaj kopiita foje kaj refoje. . .
En Sudo, sterk-boatoj tage-nokte
veturas tra la akvoj de l' rivero Perlo,
en Nordo, flugas sledoj kun neĝpolvoj
sur la glacia voj' de Hejlonggiang,
.

simile al sovaĝanseraj vicoj
pli frue tamen anoncanta l' venon de printempo.
Printempo fluas sur ŝpatklingoj!
Printempo gutas de vippinto!
Regajnu l' perdojn
kaŭzitaĵojn de la "kvarpersona bando"!
Jen sonas juroj de la kanaletoj en la Sudo

ĝis la kampeĝoj kaj ŝoseoj norde de la Granda
Muro!

Aŭdiĝos baldaŭ jam kukola kanto
en la printempa zefiro
kaj tra la vasto de mil kilometroj
ekflamos persikfloroj, ŝvebos lanugoj de saliko.

En Daking,
rekordon novan kreas
boriloj en profund' de l' tero,
kaj ruĝaj flagoj
sur putoturoj
simbolas la fieron de l' laboristaro de Ĉinio.
Jen post la kunveno
por lerni de Daking
multego de fabrikoj kaj minejoj,
de grandaj ŝtalaj urboj
ĝis lokaj "kvin malgrandaj"*
ĉiuj similas al batalĉevaloj
aŭdintaj sturm-signalon.
Dentradoj fluge turniĝadas!
Fajrego muĝe brulas!
Marteloj laŭte tintas!
Vaporo forte ŝprucas. . .
Inter la montoj kaj riveroj de Ĉinio,
ĉiu el ĝiaj
motoroj socialismaj
urĝeme vokas
al ĉiu pec' da erco,
al ĉiu gut' da riverakvo,
al ĉiu granda arbo,
al ĉiu juna planto. . .
Jen tie ĉi sireno urĝas
arganojn kaj erc-ĉarojn,
jen tie ilmaŝinoj
tranĉadas je plej alta rapideco;

en frosta fos' bluaj flamoj
lumigas oletubon longan je mil kilometroj;
sur rokmureg' boriloj pneŭmatikaj
mintruojn faras inter nuboj. . .
Ho, en nebulo densa
kaj neĝvualo
kaŝiĝas kiom da ardegaj laborejoj,
bruplenaj konstruejoj
kaj larĝaj vojoj kun trafiko vigla. . .
Ho, jes, ni nepre
regajnos la perdaĵojn de la "kvarpersona band' "
kaŭzitaĵn!

Sloganoj ruĝas, varmas kaj altas pli ol
saltanta flamo;
neestingebraj por vento
aŭ de nebul' kaj
nefaligeblaj de neĝego!
Ha! Jen alvenas novaj industriaj trupoj.
Sidante sur tornistroj
en la spirito de l' Daking-aj pioniroj,
ekskribas ili sindevigon
al l' estimata kaj amata Prezidanto Hua:
Atendu nian ĝojindan informon,
kaj morgaŭ. . .

Ho, tra la tuta
Ĉinio
ja kie ne ruliĝas tajdo de printempo!
Regajnu la perdaĵojn
kaŭzitaĵn de l' "kvarpersona bando"!
Regajnu la perdaĵojn
kaŭzitaĵn de l' "kvarpersona bando"!
La ĵuro saturita de ŝvitgutoj,
la decidem' solida kiel ŝtalo.
Regajnu! Perdu ni eĉ ne momenton!

Regajnu! Perdu ni eĉ ne sekundon!
La venko ĉiam apartenas
al nia fido kaj al niaj manoj;
la venko ĉiam apartenas
al la marteloj kaj sarkiloj niaj!
La ardaĵ jaroj,
la arda tempo,
la arda tero
hardadis niajn ostojn kaj muskolojn,
lertigis niajn manojn kaj piedojn,
kaj ankaŭ nutris nin —
riĉigis, freŝigis kaj vigligis
la pensojn kaj la sentojn niajn.
La revoluciuloj —
la veraj revoluciuloj,
jam vidas, tra l' neĝblovo,
sennombrajn ruĝajn florojn kaj smeraldajn
salikŝosojn!

Ni scias,
ke fosi kanaleton
por alkonduki akvon
kaj meti trakon
por lasi trajnon kuri
signifas ja impeton
de la revoluci' proleta, komencita
de Prezidanto Maŭ.
Jen la unuan frazon en taglibro
oni skribis por printempo nova.
Jen estas la unua venkinformo
per ambaŭ manoj prezentata de ni al printempo.
Ho, granda vivo, granda lukt' kaj granda
militiro,
la ideal' kaj venko
alvokas kune nin;

esper' kaj forto
ekbrilas kune al ni!
Granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ,
amataj estimataj Ĉefministro Ĝoŭ,
kaj Prezidanto Ĝu,
bonvolu vi revui!
Rigardu kiel viaj heroaj gefiloj
galopas al la nova tempo. . .



* T. e. malgrandaj feraj-ŝtalaj fabrikoj, malgrandaj karbominejoj, malgrandaj kemisterkaj fabrikoj, malgrandaj cementaj fabrikoj kaj malgrandaj maŝin-fabrikoj funkciigataj de gubernioj kaj popolaj komunumoj.



Naskiĝo de

piana koncĉerto

de BAJ SAN

ANTAŬ nelonge mi vizitis ĉinan pianiston Liu Ŝikun.

Bela piana muziko alfluis al mi renkonte kaj tiu nevidebla gvidisto kondukis min en lian pianan ĉambron. La svelta muzikisto kun okulvitroj varme etendis al mi sian

manon kaj min salutis. Ĝuste estas tiu paro da manoj, kiuj lerte manipulis la pianan klavaron kaj produktis multajn belajn muzikajojn.

En la jaro 1956, Liu Ŝikun en sia 17-jara aĝo gajnis la trian pre-

mion kaj specialan premion de la *Hungara Rapsodio N-ro VI* en la Internacia Piana Konkurso Liszt Ferencz, kaj en 1958 li gajnis la duan premion en la Internacia Piana Konkurso P. I. Ĉajkovski. Per tio li honoris sian patrolandon.

Liu Sikun ludas por komunumanoj en antaŭturbo de Kantono.



Per sia eminenta arto, Liu Sikun gajnis laŭdojn de kolegoj en la internaciaj muzikaj rondoj kaj varmajn aplaŭdojn de enlandaj aŭskultantoj. Tamen li meritas pli grandan laŭdon en tio, ke li senĉese paŝas antaŭen en naciigo kaj popularigo de piana muziko.

MOVFORTO KAJ FONTO

Nia interparolo komenciĝis ĉirkaŭ la piana konĉerto *Batalo kontraŭ Tajfuno*, kiun li ludis lastatempe. Tiu muzikaĵo estis verkita de li kune kun kelkaj kamaradoj en 1973. La konĉerto konsistas el jenaj kvar partoj: 1. Marhavena Mateno, Gaja Laborado; 2. Atako de Tajfuno, Batalo kontraŭ Ĝi; 3. Sereniĝo, Kanto pri la Venko; 4. Entuziasma Antaŭenmarŝo en la Venko. Plene aplikante la arton de piano kaj orkestro, tiu verko vivece prezentas la revolucionan spiriton kaj heroecon de ĉinaj marhavenaj laboristoj en energia konstruado de socialismo kaj batalo kontraŭ natura katastrofo.

“Kiel vi kreis tiun verkon?”

Liu Sikun ne tuj respondis. Liaj okuloj fikse rigardadis foton de Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ kaj Prezidanto Ĝu De sur la piano. Li meditis. . .

En la granda kultura revolucio, li estis persekutata de la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ en koluzio kun Giang King kaj ŝiaj bandanoj dum 5 jaroj kaj 9 monatoj. Li rekomencis labori nur en 1973 dank’ al foj-refojaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj interveno de Ĉefministro Ĝoŭ.

Li diris, ke post kiam li denove eklaboris, Prezidanto Maŭ instrukiis al li, ke li faru prezentadon kaj kreu naciajn pianajn verkojn. Ĉefministro Ĝoŭ instrukiis kaj faris konkretan aranĝon, ke li kun kelkaj kamaradoj iru al marborda regiono de suda Ĉinio por profundiĝi tie en la vivon. En centra tereno atakita de tajfuno, ili vidis gigantan perdon alportitan de forta tajfuno al la popolo, aŭdis rakontojn pri heroaj faroj de la popolo de la pla-

gita regiono en unuanima batalo kontraŭ tajfuno kaj rekonstruado de siaj hejmlokoj, kaj propraokule vidis la revolucionan spiriton de la popolo de tiu regiono sin apoganta sur propraj fortoj.

Foje, tajfuno furioze atakis vartenejojn de haveno per kunportata marakvo. Laboristoj bataladis, spite al vivdanĝero, kontraŭ la ondoj por savi la posedaĵojn de la ŝtato. Iliaj streĉa laborado, alta spirito, revolucia optimismo kaj firma kredo pri sia certa venko super la natura katastrofo montris la noblan kvaliton de la ĉina laboristaro. Kiel kortuŝa muzika verko tio estis! Li grimpis sur la altan observejon de ŝipo, rigardis ĉirkaŭen kaj vidis ke multaj ŝipoj rapidas tien kaj ĉi tien kaj arganoj vigle swingadas siajn brakojn por levado. La haveno dronas en atmosfero de gaja kaj streĉa laborado de la dokistoj. La sentoj pri la realaĵo, kvazaŭ serioj post serioj da muziknotoj, stimulis lin al verkado. Kiel popola muzikisto povas sin deteni de pri-

kanto de tia arda vivo kaj de uzo de lia piana arto por stimuli la batalvolon de la popolanoj! Sekve ili komponis tiun verkon. Sed antaŭ ol la verko estis prezentita al la spektatoroj, karieristino Giang King kaj ŝia konfidenculo en la Ministerio de Kulturaj Aferoj ĉikanis la verkon pro malamo al revoluciaj verkoj. Ili jen ordonis, ke nur unu tema melodio estu aplikata tra la tuta muzikaĵo, por turni la verkon en tedan monotonajn, jen postulis ŝanĝi la koncerton en solon por malfortigi ĝian influon. Sed kamarado Liu Ŝikun kaj liaj kolegoj spitis tion kaj alprenis tri ĉefajn temomelodiojn en la verko laŭ la bezono de la enhavo. Kaj laŭ sia propra ideo ili komponis kaj unu koncerton kaj unu solon. Malsukcesinte en sia artificio, la konfidenculo de Giang King en la Ministerio de Kulturaj Aferoj prokrastis la cenzuradon kaj ne pasigis ĝin, uzante la povon en siaj manoj. Ĉar Giang King kaj ŝiaj bandanoj ne permesis, ke Liu Ŝikun kaj liaj kolegoj prezentu la verkon publike, ili do iris al bazaj unuoj por fari tie prezentadon al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj peti de ili opiniojn.

PIANA LINGVO KOMPRENEBLA

Kiel la muzika verko enkorpigis la principon de arta kreado elmetitan de Prezidanto Maŭ **“servigi antikvajn al nuntempo, servigi eksterlandajn al Ĉinio”**?

Liu Ŝikun diris, ke je la komenco de la koncerto, sopranaj kordinstrumentoj ludas uverturon imitante la ĉinan nacian anĉan blovinstrumenton *ŝeng-o*. Tion dirante li sidiĝis ĉe la piano kaj ekludis la unuan parton de la koncerto. Ludande li

klarigis, ke post la komenco de la muzikaĵo, kordinstrumentoj inkluzive de harpo, franca korno kaj ĉina bambua fluto produktas freŝan kaj serenajn muzikon impresantan kvazaŭ la suno estus leviĝanta super senlima vastaĵo de trankvila maro. Tuj sekve, piano per klara kaj streĉa takto prezentas gajan laboradon de dokistoj de la nova Ĉinio.

Kiam Liu Ŝikun ludis la duan parton, li ĉesigis sian klarigadon kaj koncentris sian atenton al la ludado. Tio estas la kulmino de la tuta koncerto. Krucigante siajn manojn li ludis sinsekve oktavajn kromatajn gamojn kaj unuopajn kromatajn gamojn tuj je la komenco, kaj per tio prezentis vivecan bildon de ruliĝado de nigraj nuboj en hurlanta ventego kaj saltado de teruraj ondoj. Kaj tuj poste, imitante kordbalaan ludon de bivo li produktis seriojn da notoj por pliintensigi la etoson. En la parto pri skribanta la bataladon de la dokistoj kontraŭ ventego kaj ondoj, la sinsekvaj oktavaj gamoj luditaj de la dekstra mano kaj la akordoj luditaj de la maldekstra mano sur la piana klavaro sonis kvazaŭ muziko de la ĉina nacia plukinstrumento bivo ludata per kontinua kaj balaa plukado. Kelkiam la piano imitas muzikon de perkutinstrumentoj en ĉina opero kun ĉiam pli rapida takto. Kaj tiel pompmuzika ludmaniero uzita por teknika parado en iuj eksterlandaj koncertoj estas kritike aplikita por prezenti novan enhavon kaj figurojn en tiu verko. En tiu variema parto de la koncerto, la pianisto sukcese figurigis, per klara mizika lingvo, la gigantajn heroojn batalantajn kontraŭ tajfuno.

La tria parto de la koncerto prezentas, per serenaj kaj gajaj melodioj, havenon en ora sunlumo post

la ŝtormo. La violonĉelo prezentas per kantosimila melodio la profundan amon de la popolamasoj al la Komunista Partio, kiu gvidas ilin en venka batalado.

Liu Ŝikun diris, ke estas malfacile elmontri, ke kiuj partoj de la koncerto estas verkitaj laŭ la principo **“servigi antikvajn al nuntempo, servigi fremdlandajn al Ĉinio”**. Piano estas fremdlanda instrumento kaj koncerto estas fremdlanda formo. En iuj partoj la koncerto alproprigis al si melodiojn de la solo *Batalo kontraŭ Tajfuno* por la ĉina kordinstrumento *ĝeng-o*, kaj iuj partoj estas tiel luditaj ke ili aŭdiĝas simile al ĉinstila muzikaĵo ludita per tradiciaj naciaj muzikiloj. Nemalmultaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiuj aŭskultis provan ludadon de la koncerto, skribis al Liu Ŝikun, ke tia piana muziko estas komprenebla kaj piaĉas al ili. Iu laboristo diris, ke la piano povas paroli kaj esprimi ilian koran senton.

SENTO DE FIERO

Fine Liu Ŝikun ĝoje diris al mi, ke estas tre interese fari prezentadon por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en bazaj unuoj. Li kaj liaj kolegoj ludis la pianon solon *Batalo kontraŭ Tajfuno* en fabrikoj, minejoj, vilaĝoj, kazernoj kaj fiŝvilaĝoj. Multfoje li ludis ne en teatro sed en laborejo aŭ manĝejo, sur draŝejo, antaŭ kazerna domo aŭ sur armea posteno. Li iatempe ludis pianon sub la ĉielo, dum la spektantoj bonorde sidantaj surtere aŭ alte sur arboj kaj tegmentoj aŭskultis kun granda atento kaj forte reagis al la prezentado. Li diris, ke tiam, kaj nur tiam li sentis, ke lia sento kunfandiĝis kun tiu de la spektantoj. Li sentis fieron, ke lia arto estas komprenita kaj varme akceptita de la popolo.



La Opia Milito

de SI GIN

En la periodo de 1840 — 1842, la registaro de la brita burĝaro faris agresan militon kontraŭ Ĉinio por prirabi nian landon kaj protekti kriman opian negocon. Tio estis la Opia Milito. Por defendi la patrolandon kaj rezisti kontraŭ la agreso la ĉina popolo brave leviĝis al batalo kaj per tio malfermis novan paĝon de la ĉina moderna historio.


En la kvardekaj jaroj de la 19-a jarcento, Britio, Francio, Usono kaj aliaj landoj jam evoluis en kapitalismajn landojn. Britio, plej disvolviĝinta en industrio, superregis la tutan mondon, kiel kolonia potenco n-ro 1. Por ĉasi altan pro-

fiton britaj kapitalistoj urĝe bezonis pli vastan eksterlandan merkaton por dumpingi siajn industriaĵojn kaj rabi malkarajn industriaĵajn krudmaterialojn. Ĉinio kun vasta teritorio, abundaj riĉfontoj kaj grandnombra loĝantaro fariĝis ilia agresa celobjekto.


En tiu tempo, Ĉinio regata de King-dinastio sin trovis en la lasta periodo de la feŭda socio, kaj la memsufiĉa natura ekonomio kun la malgranda kamparana ekonomio kaj familia metiindustrio en kombino ankoraŭ okupis la ĉefan lokon. Ĉar vestaĵoj kaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj de la malriĉaj kamparanoj plejparte estis faritaj de ili mem

per la manoj, Britio trovis malmultajn aĉetantojn en Ĉinio por siaj kotonŝtofo, drapo kaj aliaj industriaĵoj. En la komenca periodo de la normala komercado kun Britio, Ĉinio ĉiam havis favoran saldon. Por aĉeti ĉinajn teon kaj silkon, la britaj kapitalistoj devis pagi al Ĉinio multajn arĝentajn monerojn. Por ŝanĝi tian staton kaj akiri altan profiton, la britaj kapitalistoj trovis eksterordinaran varon — opion. Ili grandkvante dumpingis opion sur la merkato de Ĉinio per malnoblaj rimedoj de armita kontrabando kaj subaĉetado de ĉinaj ŝtatoficistoj. Ankaŭ Usono kaj cara Rusio partoprenis en la krima kontrabando de opio al Ĉinio. Dum la 40 jaroj

Jen la komanda flago uzata de la Sanjuanli-a popolo en sia rezisto kontraŭ la britaj agresantoj



Jen Sanjuan-templo, kie la Sanjuanli-a popolo kolektiĝis en 1841 por rezisti kontraŭ la brita agresado.



antaŭ la Opia Milito, Usono kaj Britio ŝtele enportis pli ol 400,000 kestojn da opio en Ĉinion.

Opio tajde torentis en Ĉinion, kaj sekve ĉina arĝento grandkvante fluis eksterlanden. La kvanto de la ĉina arĝento perdita en la dudekaj kaj tridekaj jaroj de la 19-a jarcento superis 100,000,000 uncojn. La feŭdaj regantoj transigis gigantan monsumon konsumitan por fumi opion sur la kamparanojn kaj metiistojn, kaj multe pezis ŝarĝon sur la laboranta popolo. Krome, la opio rekte toksis la korpon de la ĉina popolo. Ĝuste kiel Marks indigne montris: **“Kontraŭleĝa opia negoco ĉiujare plenigas la ŝtatan kason de Britio per difektado de homa vivo kaj koruptado de moralo.”**

La ĉina popolo, kiu profunde suferis de opio, forte postulis malpermesi opifumadon kaj opinegocadon. Ili nomis opion vipuro, opikontrabandan ŝipon diabla ŝipo kaj fremdlandajn agresantojn tigroj kaj lupoj. La kapitulacemaj ŝtatoficistoj en la regantaro de King-dinastio, kiuj havis striktan rilaton kun intereso de opinegoco pro opifumo kaj opivendo kaj estis subaĉetitaj, ĉiamaniere protektis la opian kontrabandon kaj subfosis la batalon kontraŭ la prohibicio de opio. Aliaj patriotaj ŝtatoficistoj kun Lin Zehju kiel la ĉefo vidis la seriozan rezulton kaŭzitan de la opia inundo kaj maltrankvile kriis: Se la afero tiel daŭros, do post kelkdek jaroj Ĉinio ne havos oficirojn kaj soldatojn por batali kontraŭ malamikoj kaj monon por provizi la armeon. Ili pledis por protekti la interesojn de la feŭda lando kaj rigore efektivigi opiprohibicion. Konsiderante la profundigon de la socia krizo, la ŝanceligon de sia regado kaŭzita de la opia inundo kaj la amasan batalon por opiprohibicio, la imperiestro en la regperiodo Daŭguang

devigite sendis Lin Zehju kiel revizoron al Kantono por kontroli kaj prohibicii opion.

En marto de la jaro 1839, Lin Zehju venis al Kantono kaj firme esprimis: “Mi kiel revizoro ne revenos al Pekino se opio ne estos komplete prohibiciita.” Subtenate de la popolo li alprenis decideman rimedon de opiprohibicio kaj severe ordonis ke fremdlandaj opikomercoj donu la tutan kvanton da opio kaj samtempe faru promeson “neniam plu alporti opion en estonteco”. La usonaj kaj britaj opikomercoj devigite donis pli ol 20,000 kestojn da opio kun pezo de pli ol 1,150 tunoj. Je la 3-a de junio, sur la marstrando de Humen Lin Zehju ordonis forbruligi la tutan kvanton da konfiskita opio en ĉeesto de vastaj popolamasoj. Dum pli ol 20 tagoj de la bruligado de la opio, miloj kaj dekmiloj da homoj alrapidis tien de proksimaj kaj foraj lokoj por rigardi. La forbruligo de la opio en Humen estis grava venko de la opiprohibicia batalo en Ĉinio. Ĝi peze batis fremdlandajn agresantojn kaj enlandajn kapitulacistojn kaj manifestis al la tuta mondo firman revolucian volon de la ĉina popolo en oponado kontraŭ la fremdlanda agreso.

La agresita milito de la brita burĝaro kontraŭ Ĉinio estis longe kovita. Post la hontinda bankroto de la opinegoco, la brita registaro malkaŝe faris agresan militon sub la preteksto de protekto de la komerco.

En junio de 1840, Britio ekspedis pli ol 40 militŝipojn por invadi la provincon Guangdong. Sub la komando de Lin Zehju, la armeoj kaj popolanoj de Kantono jam antaŭ longe faris bonan dispozicion por rezisti kontraŭ la malamikoj. Oni instalas ĉe la enirejo

de Perlo-rivero flosojn kaj ferĉenojn, tie nove konstruis kanonfortikaĵojn kaj samtempe mobilizis tieajn fiŝistojn por organizi surmaran milicion. Tiamaniere la brita agresita trupo ne povis surteriĝi en Guangdong kaj devis sin direkti norden laŭ la marbordo. En aŭgusto, la britaj militŝipoj entrudiĝis en la maron ĉe Tiangin tra Bohajgolfo por minaci la registaron de King-dinastio per milita forto. La forte terurita putra imperiestro de King-dinastio decidis cedi al la agresantoj. Li ordonis senigi Lin Zehju je la ofico kaj sendis Ki Ŝan, kiu pledis por kapitulaco, al Kantono por trakti kun la britaj agresantoj.

En novembro de 1840 Ki Ŝan atingis Kantonon. Por favori la agresantojn, li eĉ ordonis malkonstrui la militajn fortikaĵojn, redukti la mararmeon, malorganizi la surmaran milicion kaj puni la kontraŭbritajn generalojn. En januaro de 1841, Ki Ŝan nesankciite subskribis la naciperfidan «Ĉuanbi-an Projektan Traktaton», en kiu estas konsentitaj koncesio de Hongkong, kompenso de la perdo kaŭzita de la forbruligo de opio kaj aliaj agresaj postuloj. La imperiestro de King-dinastio opiniis, ke koncesio de la teritorio kaj kompenso de la perdo difektas la “dignon de la imperiestro de King-dinastio”. Li denove decidis batali kontraŭ Britio kaj sendis generalon Ji Ŝan al Kantono por gvidi militan aferon. Tamen Ji Ŝan ne havis firman decidon por la batalo kaj ĉiutage diboĉis en Kantono.

Ĉar li ekstreme malamis la popolon, li elmetis la reakcian principon “pli grave gardi kontraŭ la popolo ol kontraŭ la agresantoj”. En milita afero li esperis akiri facilan venkon per aventura surprizatako kontraŭ la malamikoj. Sed,

je la ekbatalo lia trupo jam suferis de malvenko. En majo, li subskribis humiligan «Kantonan Pacigan Traktaton» kun la malamikoj, laŭ kiu la armeo de King-dinastio devis sin tiri el la urbo Kantono fore je 30 kilometroj. Poste la registaro de King-dinastio pagis 6,000,000 arĝentajn dolarojn al Britio por reakiri la urbon.

Kontraŭe al la registaro de King-dinastio, kiu praktikis pasivan reziston kaj kapitulacion, la ĉina popolo kun glora revolucia tradicio ĉiam persistis en la batalo kontraŭ la agreso de Britio.

Post kiam la brita agresa armeo eniris en la urbon Kantonon, ĝi ĉie masakris homojn, bruligis konstruaĵojn, ofendis virinojn kaj forrabis havaĵojn. Tio multe indignigis la tieajn popolanojn, kaj ili decidis forte puni la agresantojn. Je la 29-a de majo, kiam la britaj armeanoj rabis havaĵojn en Sanjuanli en la norda antaŭurbo de Kantono, legomkulturisto Vej Saŭguang kaj aliaj tuj brave batalis kontraŭ ili kaj ĉeloke mortigis kelkajn malamikojn. Konsiderante ke la malamikoj nepre faros venĝon, la popolo de


Sanjuanli unuigis kamparanojn de 103 apudaj vilaĝoj kaj organizis sin en kontraŭbritan trupon kun kelk-mil homoj. En la sekvanta tago, pli ol 1000 britaj agresantoj kun pafiloj kaj kanonoj arogante invadis Sanjuanli. La bone sin preparinta Sanjuanli-a popolo unue allogis la agresantojn al iu valo, kaj poste tuj je tamtamado la embuskantaj kamparanoj kun glavoj, lancoj kaj pioĉoj en siaj manoj sturmis mal-supren de la monto kaj sieĝis la malamikojn. La batalo daŭris ĝis la tagmezo. Subite ekfulmis kaj ektondris. En la torenta pluvego la Sanjuanli-a popolo plene fiaskigis la malamikojn. Iuj el la agresantoj konsternite forkuris, kaj la aliaj surgenuiĝis por petegi indulgon. En la batalo la Sanjuanli-a popolo akiris grandan nombron da trofeoj. Kuraĝigate de la triumfo ĉe Sanjuanli, kelkdek mil popolanoj de Kantono sieĝis Sifang-an Kanonfortikajon de la agresa armeo kaj **jetis la lastan en grandan panikon.** Poste la agresa armeo estis savita el la sieĝado nur dank' al protektado farita de kapitulacaj ŝtatoficistoj de King-dinastio. Tiu kon-

traŭbrita batalo skribis brilan paĝon en la ĉina moderna historio. Gi subigis arogantecon de la malamikoj kaj multe levis la batalan volon de la ĉina popolo por rezisti kontraŭ fremdlanda agreso.


Ankaŭ ĉe la marbordoj de Ĝe-giang, Giangsu kaj aliaj provincoj, la brita agresa armeo renkontis fortan rezistadon de la ĉinaj armeanoj kaj popolanoj. En aprilo de 1841, por akiri pli multan privilegion en Ĉinio, la britaj agresantoj decidis plivastigi la agresan militon. En oktobro, ili refoje okupis la marbordajn urbojn Dinghaj, Ĝenhaj kaj Ningbo. La kamparanoj de orienta Ĝe-giang meminciate sin organizis, brave batalis kontraŭ la malamikoj kaj mortigis multajn britajn agresantojn en kelkaj monatoj. La Tajvan-aj armeanoj kaj popolanoj de nia lando dufoje repuŝis atakojn de la britaj militŝipoj.

En junio de 1842, la brita armeo entrudiĝis en Jangzi-riveron. Ĉen Huaĉeng, preskaŭ 70-jara komandanto de Giangnan, gvidis oficirojn kaj soldatojn en brava defendado de la kanon-fortikaĵo de Vusong,

Uniformoj, sabro kaj sigelilo de la britaj agresantoj, batalakiritaj de la Sanjuanli-a Kontraŭbrita Korpuso de Kantono



Opikontrabanda ŝipo ankranta ĉe Lingtingjiang de Guangdong en 1839



vundis kelkajn malamikajn militŝipojn kaj fine oferis sian vivon en la sangbatalo. La brita armeo daŭre sin direktis okcidenten laŭ Jangzi-rivero. La ambaŭborda popolo persistis en batalo kaj senĉese surprizatakis la britan armeon kaj bruligis malamikajn ŝipojn. En julio, kiam la brita armeo atakis Ĝengiang, la tieaj patriotaj oficiroj kaj soldatoj kaj popolanoj faris fortan rezistadon. Iu brita oficiro diris: “Multaj ĉinaj soldatoj sturmis nian armeon fronte al bajonetoj. Iutempe ili eĉ kaptis niajn soldatojn kaj malsupren saltis de la urbomuro brakumante ilin.” Parolante pri la batalo ĉe Ĝengiang la revolucia instruisto Engels montris: **“Se tiuj agresantoj ĉie suferus samem reziston, ili absolute ne povus atingi Nankinon.”**

En aŭgusto, la brita militŝiparo proksimiĝis al Nankino. La registaro de King-dinastio estis timigita de t. n. supera milita forto de la agresantoj. Timante, ke plene bankrotos ĝiaj militaj fortoj pro daŭrigo de la milito kaj leviĝos la popolo por renversi ĝian regadon profitante la ŝancon, la registaro de King-dinastio perfidis naciajn interesojn kaj kapitulacis al la agresantoj. La milito malvenkis ĝuste pro la naciperfida linio de la registaro de King-dinastio malami la popolon enlande kaj kapitulaci al fremdaj landoj. La 29-an de aŭgusto, la britaj agresantoj devigis delegiton de la registaro de King-dinastio subskribi la naciperfidan «Nankinan Traktaton».

La «Nankina Traktato» inter Ĉinio kaj Britio estis la unua neegalrajta traktato trudita de fremdlanda kapitalismo al Ĉinio en la ĉina moderna historio. Ĝia ĉefa enhavo inkluzivis la koncesion de Hongkong, pagon de 21,000,000 arĝentaj dolaroj por kompensi la perdojn kaŭzitajn de la forbruligo

de opio kaj la milito, malfermon de kvin urboj Kanton, Hiamen, Fuĝoŭ, Ningbo kaj Ŝanhajo kiel komercaj havenoj kaj interkonsenton pri dogano. Nelonge post tio, Britio akiris “konsulan jurisdikcion” kaj “unuflankan traktadon de la plej favorata lando” per la aldonita traktato.

Ankaŭ aliaj kapitalismaj potencoj de Eŭropo kaj Ameriko unu post alia venis al Ĉinio kaj devigis la registaron de King-dinastio subskribi neegalrajtajn traktatojn, nome la «Vanghia-an Traktaton» inter Ĉinio kaj Usono, la «Huangpu-an Traktaton» inter Ĉinio kaj Francio tiel ke ili akiris kaj plivastigis diversajn agresajn privilegiojn.

Post la Opia Milito, la naturo de la ĉina socio kaj tiu de la ĉina revolucio radikale ŝanĝiĝis. Antaŭ la milito, Ĉinio estis sendependa lando kun feŭda memsufiĉa natura ekonomio. Post la milito, la suvereneco de la ĉinaj teritorio, jurisdikcio, dogano kaj aliaj aferoj estis atencitaj. Por forpuŝi la ĉinajn metiindustriaĵojn el la merkato, la kapitalismaj landoj grandkvante dumpingis siajn varojn en Ĉinio utiligante sian privilegion. Tio bankrotigis grandan nombron da kamparanoj kaj metiistoj, ruinigis la bazon de la natura ekonomio kaj turnis Ĉinion paŝon post paŝo en duonkolonian kaj duonfeŭdan socion. Antaŭ la Opia Milito la kontraŭdiro inter feŭdismo kaj la vastaj popolamasoj estis la ĉefa kontraŭdiro de la ĉina socio. Post la milito la kontraŭdiro inter imperiismo kaj la ĉina nacio fariĝis la plej ĉefa el ĉiuj kontraŭdiroj en Ĉinio. Depost tiam la ĉina popolo ekprenis sur sin la du taskojn oponi kontraŭ imperiismo kaj oponi kontraŭ feŭdismo, kaj la ĉina revolucio paŝis en la novan historian periodon — la periodon de la burĝa demokratia revolucio.



EN la vasta regiono ambaŭborde de Huangŝuj-rivero, oriente de la bela Kinghaj-lago troviĝas unu el la ĉinaj nacimalpli multoj — tu-oj kun aparta kostumo. Ili portas veston kun delikate kaj brilokoloro brodita alta kolumo. La viroj ofte portas blankan robon, kaj en vintro ili aldonas al ĝi senkoluman felan surtuton. La virinoj portas ĉinstilan jaketon, kies manikoj estas faritaj el blua, blanka, ruĝa, verda kaj nigra larĝaj ŝtofribandoj, larĝan zonon ĉirkaŭ la talio kaj iam veŝton sur la jaketo.

La tu-oj nombras sume pli ol 100,000, el kiuj granda parto koncentre loĝas en la Huĝu-a Tunacieca Aŭtonoma Gubernio kaj gubernioj Minhe kaj Datong de Kinghaj-provinco kaj la alia parto diŝe loĝas en gubernioj Ledu kaj Menjuan de Kinghaj kaj la Tianĝu-a Tibet-nacieca Aŭtonoma Gubernio kaj Lanĝoŭ de Gansu-provinco.

La tu-oj estas tre malmulte menciitaj en konfidindaj historiaj verkoj. Laŭ legendoj de la tu-oj kaj la tibetlingva literaturo de King-dinastio, en la komenco de la 13-a jarcento Gjelet, generalo de Ĝingis-Hano, garnizonis en la nuna Huĝu-gubernio; post kiam li mortis pro malsano, liaj subuloj restis tie kaj edziĝis al tieaj lokanoj, kaj iliaj posteuloj nomiĝas tu-oj.

La tu-oj havas sian propran parolan lingvon, sed ne skriban, kaj ili uzas la hanan skriban lin-

LA tu-oj

de ZONG MIN

gvon en la ĉiutaga vivo. La lingvo de la tu-oj apartenas al la mongola lingvofamilio de la altaj-a lingvosistemo kaj pli ol duono de iliaj vortoj similas al mongolaj.

En la antikveco la tu-oj okupiĝis ĉefe pri paŝtado kaj nun ili okupas sin ĉefe pri agrikulturo kaj prenas bredadon de hejmaj birdoj kaj brutoj kaj metiindustrion kiel flankajn okupojn. Antaŭ la Liberiĝo, en la vasta regiono de la tu-oj troviĝis malmultaj loĝantoj kaj meznombro ĉiu laborkapabla homo havis 19 muojn da agro plejparte monta. Pro feŭda ekspluatado kaj malzorgema kulturado la produktokvanto de agrikulturo estis tre malalta. La hektara produktokvanto de tritiko estis nur ĉirkaŭ 750 kilogramoj kaj tiu de hordeo ĉirkaŭ 1,125 kilogramoj.

Antaŭ la Liberiĝo plejparto de la agro en la tu-a regiono apartenis al temploj kaj bienuloj, kaj la religiaj temploj kaj superaj lamaoj estis la plej grandaj terposedantoj. La tu-oj estis forte ekspluatataj kaj subpremataj de la religiaj temploj. Kaj krome ili suferis kruelajn ĉantaĝojn kaj impostadon de la loka militaristo Ma Bufang en Kinghaj. Laŭ nekompleta statistiko, la specoj de impostoj metitaj de Ma Bufang sur la tu-an popolon antaŭ la Liberiĝo nombris pli ol 40. Ĉirkaŭ duono de la fruktoj de la diligenta laborado de la tu-oj estis forrabita de la banditoj de Ma Bufang. Dum

la periodo de la reakcia regado de Kuomintango Ma Bufang ĉiujare faris 2-3 kaj eĉ 4 devigajn varbojn de tu-oj kiel soldatoj, kio multe damaĝis la tu-ojn.

Kie estas subpremo, tie estas batalo. La tu-a popolo kun glora batala tradicio multfoje leviĝis kontraŭ la subpremo. En la jaro 1644, kiam He Gin, generalo de Li Ziĉeng, ĉefo de la kamparana leviĝo, atakis Jongdeng-regionon de Gansu, la tu-oj brave leviĝis por kunagi kun la leviĝa trupo kaj ili kune ekstermis la lokajn reakciajn regantojn. En la moderna epoko la tu-oj faris senĉesan bataladon

kontraŭ subpremo kaj ekspluatado fare de imperiismo, feŭdismo kaj la reakciuloj de Kuomintango. En 1936-1937, kiam la ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo trapasis Gansu kaj Kinghaj, la tu-aj laborantaj popolanoj ĉiamaniere helpis ĝin kaj metis sian esperon de plena liberiĝo sur la Komunistan Partion de Ĉinio kaj la Ruĝan Armeon.

En septembro de 1949 la tu-a popolo liberiĝis kun senkompara ĝojo.

Post la Liberiĝo la tu-a popolo venke ekstermis banditojn, batalis kontraŭ la lokaj tiranoj kaj faris agraran reformon. En februaro de 1954 fondiĝis la Huĝu-a Tu-nacieca Aŭtonoma Gubernio. Kvankam la procento de la tu-oj en la tuta loĝantaro de la gubernio estas malgranda, tamen la gubernio efektivigis naciecan aŭtonomecon, kio plene montris la respekton de la Partio kaj ŝtato al la egalrajteco de la tu-oj.

Tu-aj virinoj



Post la Liberiĝo impete disvolviĝis la ekonomia kaj kultura aferoj en la tu-a regiono. Dank' al sinteza ordigo al montoj, riveroj, arbaroj kaj kampoj kaj grandskala fundamenta konstruado de kampoj la agrikultura produktado altiĝas jaron post jaro. En 1958, la diversnacieca popolo de Huĝu-gubernio kun revolucia spirito "homa volo certe venkos la naturon" konstruis 13 trunkajn kaj pli ol 100 branĉajn kanalojn kun totala longeco de pli ol 2,000 kilometroj kaj pliigis la irigaciatan areon je 6,000 hektaroj. Post kiam la granda gvidanto Prezidanto Maŭ alvokis "lerni de Daĝaj en agrikulturo", la tu-oj kaj

aliaj naciecoj de la gubernio varme disvolvis amasan movadon de ordigo de rivero kaj konstruo de kampoj, kaj konstruis akvokonservejojn, pumpstaciojn kaj aliajn fundamentajn irigaciajn instalaĵojn.

Antaŭ la Liberiĝo, en Huĝu-gubernio troviĝis nur kelkaj simplaj metiejoj servantaj al agrikulturo. Post la Liberiĝo ĝi fondis industrion de agrikulturaj maŝinoj, karbo, cemento, kemia sterko, fero, prilaborado de ligno, porcelanaĵoj, papero, vino kaj manĝaĵoj.

Antaŭ la Liberiĝo nur tre malmultaj el la tu-oj scipovis legi. Post la Liberiĝo tie ĝeneraliĝis eduko de

mezlernejo kaj elementa lernejo kaj iuj el ili eĉ studas en Pekino kaj Langŝou.

La tu-oj ŝatas kanti kaj danci kaj plenvole sin amuzas per kantado kaj dancado en la Printempa Festo, geedziĝaj ceremonioj kaj aliaj festoj. Ankaŭ dum laborado sur kampoj, paŝtado en montoj kaj ĉarkondukado survoje ili ofte kantas laŭte. Pro manko de skriba lingvo, ĉiuj tu-aj popolaj literaturajoj transdoniĝas buŝe de generacio al generacio, kaj la plejparto de ili estas prezentblaj eposoj. La tu-aj kantoj estas multspecaj kun alta kaj sonora melodio kaj libera takto.




ELTERIGITA BRONZA ĈARO KUN ĈEVALO DE LA ORIENTA HAN-DINASTIO

En la provinco Gujĝou rara historia objekto — bronza ĉaro kun ĉevalo de la Orienta Han-dinastio (25-220 p. K) estas elterigita. Tiu eltrovo havas grandan valoron por koni la trafikon, ĉarsistemon kaj metalurgian teknologion de bronzfarado.

La elterigitaĵo estas longa je pli ol 140 centimetroj kaj alta je 88

centimetroj. La bronza ĉevalo interne malplena estas muldita per sablomuldilo, kaj ĝia maldika ŝelo montras altan muldarton. Ĝi prenas vivecan pozon de blekado kun levitaj kapo kaj vosto, starigitaj oreloj, malfermita buŝo kaj maldekstra kruro antaŭen levita. La



ĉaro havas du kurbajn timonojn, du radojn kun po 12 spokoj kaj oblongan keston kaj similas en

formo al vera ĉaro. Ĝi estas kompleta kaj eleganta kun relative alta metiarta nivelo.

DU BONAJ SPECIOJ DE BREDATA FIŜO

Du novaj specioj de bredata fiŝo — hibridigita karmo kaj skvameta fiŝo (*Xenocypris argenteo*) estas sukcese elkulturitaj en Ĉinio. La nomitaj specioj karakteriziĝas per rapida kresko, facila generado kaj delikata bongusta viando.

La hibridigita karmo devenas de du malsamaj specioj de karmo. Ĝi havas bonan apetiton al multaj specoj de manĝaĵoj, grandan adaptiĝemon, kaj la hibridiga metodo estas simpla. En unu jaro ĝia pezo povas kreski ĝis 1-2 kilogramoj.

La skvameta fiŝo devenas de speco de sovaĝa fiŝo. Post bredado dum 1 jaro la pezo de 200 tiaj fiŝidoj kun longeco de 3-4 coloj tenataj en 1/15 hektaro da akvejo povas kreski je 20-50 kilogramoj.

Pliproduktado de ĉiutagaj bezonaĵoj en Nanning

La malpez-industria branĉo de la urbo Nanning, Guangxi, aktive disvolvas la movadon de lerno de Daking en industrio, faras teknikan renovigon kaj klopodas por produkti multajn varojn de la malpeza industrio por kontentigi la bezonon de la popola vivo.

Brakhorloĝoj "Gujhua"
pogrande produktitaj de la
Nanning-a Brakhorloĝa Fa-
briko fondita en la kultura
revolucio



En magazeno de
Nanning vendiĝas
diversaj ĉiutaga
bezonaĵoj produk-
titaj de tiu urbo.



Virinoj de la nova Ĉinio en antaŭ- enmarŝo

Ombreloj faritaj
de la Nanning-a
Ombrela Fabriko



Kadroj kaj labo-
ristoj de la Nan-
ning-a Kudroma-
ŝina Fabriko iris
al la kamparo por
peti opiniojn pri
siaj produktadoj.





La Virina Taĉmento por Subputa Laboro de Sengli-olekampo superplenumis la produktan taskon de 1976 je 49% kaj estas elektita kiel avangarda kolektivo.

Laboristinoj de la kulturejo Ruĝa Flago en la antaŭurbo de Hiangtan, Hunan-provinco, plukas tefoliojn.


Medicinaj laborantinoj de ĈPLA donas kurachelpon al kamparanoj.





Laboristinoj de la Ĝonghua-a Broda Fabriko de Vuhi brodas bildon pri "nudpieda" kuracistino.


Feliĉaj infanoj de la nova Ĉinio




Kuracistino de Hiaŭjing-strato de Hangĝou faras ekzamendon al infano.



Intelektaj junulinoj de la kultivejo "La 7-a de Majo" en Kidong-gubernio, Ĝiangsu-provinco, aktive partoprenas en agronomia esplorado kaj faras selektadon de kotono.





Infano de la Infangardeno de la Dalian-a Havenadministra Buroo lernas kalkuladon per abako.



La brigado Ruĝa Flago en Sang-ju-gubernio, Gegiang-provinco, fondis infangardenon.

Kazahaj infanoj de la elementa "tenda lernejo" Kiangin en Vusu-gubernio de Hingiang





Lernantoj de la
Tria Elementa
Lernejo de Kitun
en la urbo Tang-
ŝan aŭskultas ra-
kontadon pri bo-
naj faroj de la
heroo Lej Feng
fare de ĈPLA-
ano — eksterler-
neja instruisto.

Infanoj de la infangardeno de Hiŝa-strato, Ŝanhajo, faras seĝan gimnastikon.



Valoraj vegetaĵoj



Sur la Kinghaj-Tibeta Altebenajo abundas ne nur variaj majestaj montoj kaj brue torentantaj riveroj, sed ankaŭ valoraj vegetaĵoj.

Ci tie ni prezentas kelkajn plantojn el Hengduanmontaro kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Rhododendro troviĝas vaste en sudorienta parto de Tibeto. De ĝi iuj specioj estas arboj, aliaj montras sin arbedoj, iuj sin volvantaj sur arboj, aliaj sin miksantaj kun herboj, iuj falfoliaj kaj aliaj daŭrfoliaj. Kiam alvenas printempo, rododendroj konkure partadas per ĉarmaj floroj ruĝaj, purpuraj, blankaj kaj flavaj. Esenco eltirita el rododendroj estas nun provata kiel medikamento por kuraci bronkiton.

Primoloj kaj *Androsace* sp. ambaŭ el primolacoj

kun multaj specioj troviĝas sur 4,500 metroj super marnivelo kun tre belaj floroj tiel same kiel *Mecynopsis integrifolia* (Maxim.) Franch.

Stellera chamaejasme L. estas herbeca planto kun alteco de 30-40 cm. Ĝia florperiodo estas relative longa kaj ĝiaj ruĝaj floroj iom post iom blankiĝas ĝis la tempo de velko. Ĝi havas fortan venenecon, sed ĝiaj radikoj estas uzataj kiel kuracilo kaj ankaŭ por prepari unĝventon kontraŭ skabio.

Anisodus tanguticus (Maxim.) Pascher kreskas tre vaste en Tibeto. Ĝi havas florojn ne tre belajn, sed ĝiaj radikoj, tigoj, folioj kaj semoj estas efika sedativo kaj uzataj por ekstrakti skopolaminon kaj atropinon.


Rabarbo alta je pli ol 2 metroj kun grandaj folioj kaj dikaj radikoj droge estas uzataj kiel milda laksigilo kaj fortigilo de digestado.

Hiperiko kun belaj orflavaj floroj estas uzata ankaŭ kiel medikamento por vigligi funkcion de muskoloj kaj cirkuladon de sango kaj efika ankaŭ por akcelado de sekrecio de lakto kaj faciligo de urino.


Tiuj vegetaĵoj estas utiligataj de nia vasta laboranta popolo, kontribuante al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.



Primula sp.



Androsace sp.



Rhododendron sp.



Meconopsis integrifolia (Maxim.) Franch.



Hypericum patulum Thunb.



Stellera chamaejasme L.




Rhododendron ramosissimum Franch.



Rheum palmatum L.



Anisodus tanguticus (Maxim.) Pascher.



Primulas sp.

11879

